



ESPERANTO

JANUARO 1962

55a Jaro - N-ro 674 (1)

REVUO
ESPERANTO
INTERNACIA

55a Jaro

1962

Redaktoro :
Mag. William Auld

Oficiala organo de
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(en konsultaj rilataj kun U.N.E.S.C.O.)

Administracio :
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Redakcio :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa,
(Clackmannanshire), Skotlando

enhavo 1962

ARTIKOLOJ: ĜENERALAJ

Dana sinteno al la evolulandoj	
<i>Viggo Kampmann</i>	102
Danlando. <i>Dybkaer</i>	68
H.C. Andersen-vidindaĵoj. <i>Windeballe</i>	22
Iom pri ni danoj. <i>Zacho</i>	7
La epoko de kulturaj interŝanĝoj.	
<i>MacLellan</i>	26
"La eta ĉarma land'" vin vokas! <i>Zacho</i>	85
La 47a U.K. atendas vin!	86
La scienco de la paco. <i>Makkink</i>	104
La Sofia nacia operteatro	214
Miopega decido. <i>Ruig</i>	113
Pri Mori Oogai, japana verkisto	110
Tro malmulte da nederlandaj interpretistoj en Eŭropo	125
Virinoj levas siajn voĉojn por paco. <i>Auld</i>	112

ARTIKOLOJ KAJ INFORMOJ ESPERANTISMAJ

Artistoj kaj fotoartistoj	211
Aŭtoroj, amatoroj, diletantoj kaj barbaroj	108
Baldaŭ aperos la neeldonita verko de D-ro L. L. Zamenhof	220
14a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso	133
Diktaĵo	1
Duobla juneco de Azio. <i>Milojević</i>	70
Edukada eksperimento en Anglujo	196
Enkonduko de Esperanto nun!	106
En 1965 al Tokio!	73
Esperanto en la pola gazetaro	28
Esperanto-instruado al gepatientoj	212
Esperanto kaj stenografio	17
Esp. Movado en japanaj altlernejoj	206
Filmo en Esperanto: Ĝermoj de Lumo	52
Geografia Semajno en Odense, Danujo 16,	111
Grava eldonaĵo de "Philips"	196
Helpinda samideanino	182
Intervjuo kun D-ro Maillard	24
Karavano de amikeco tra Afriko. <i>Sekelj</i>	190
Kies lingvo estas Esperanto?	182
Kulturi virgan kampon. <i>Ginz</i>	123
La Anne Frank Domo	91

La aranĝoj en Helsingør	175
La Esperanto-movado kaj neŭtraleco	128
La evoluo de la esperanta poezio. <i>Auld</i> 47,	65
La Jarlibro de UEA	111
La laborplano de UEA je klubaj nivelo	212
La poŝtmarkkolektado en 1961	23
La utilo de Esperanto	210
Letero	164
Literatura Konkurso Luis Hernandez	180
Lumo kaj obskuro (I.A.T.)	124
Mendu jam nun vian kalendaron 1963	57
Multaj fluetoj faras grandan riveron	223
Neŭtraleco. <i>Smith</i>	45
Ni estis en la Esperanto-golfo Primoŝteno	127
Pensoj pri la Internacia Diplomo	163
Per diapozitivoj	181
"Per flugiloj de facila vento". <i>Grum</i>	10
Por la Nova Domo de UEA.	57
Premio "Comella-Bassols"	92, 129, 202
Pri la gepatroj de G.S. Titov	88
Pri radiodisaŭdigoj. <i>Nikolov</i>	136
Prof. Lapenna en Nederlando	130
Raporto pri esperanta morskodo	30
Respondo al letero en no. 9	221
Spertoj pri la Internacia Diplomo.	
<i>E. Lapenna</i>	195
Stafeto, freŝe alveninta el Kanariaj Insuloj.	
<i>Thorsen</i>	62
Statistiko pri la membraro 1961	58
35a Kongreso de SAT	181
Unika jubileo	55
Vilho Setälä 70-jara	91
Virina konferenco konsideras Esperanton	194
Vizito al greka printempo. <i>Milojević</i>	126

ARTIKOLOJ: OFICIALAJ

CED kaj ĝia laboro	2
Dua Laborplano de UEA	41, 42, 172
Elektado de Komitatanoj B	34
El la Centra Oficejo	220
Internacia ekzameno	90
La ĉambroj de UEA	220
La Filmservo de UEA	36
La lasta honoro al Prof. Privat	171
La Nova Domo de UEA	9, 74
La Ora Libro pri la Domo	35
La Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj	6
Nur tri jarojn ankoraŭ ĝis Tokio!	13



Premiitoj en la Belartaj Konkursoj	
1950—1962	181
Rimarkoj pri la Informado en 1961 . . .	139
Savu niajn librojn !	182
Seminario Oriento-Okcidento	175
Solena Inaŭguro de la Nova Domo de UEA	82
Tabela trarigardo pri la Informa Laboro en 1961	138
Taskoj de la monato	67

BELARTAJ KONKURSOJ

Belarta Konkurso 1962	67
---------------------------------	----

CENTRO DE ESPLOROJ KAJ DOKUMENTADO (CED)

CED kaj ĝia laboro	2
Esperantlingvaj radio-elsendoj en 1961 . .	73
Esperanto-stratoj	73
Forpaso de D-ro Marek Wajsblum . . .	72
Instruado de Esperanto en la lernejoj en 1962—1963	208
Lernejoj	73, 135
Mallongaj informoj	135
Novaj dokumentoj de CED	135
Tradukmaŝinoj en socia perspektivo . . .	53

ĈEFARTIKOLOJ

Altigi la membronombro. <i>Lapenna</i> . . .	189
Falsaĵoj, antaŭjuĝoj, ignorado, blufoj. <i>Lapenna</i>	121
La jaro de la elektoj. <i>Lapenna</i>	21
La nova Estraro. <i>Smith</i>	145
La Nova Laborplano de UEA. <i>Lapenna</i> . .	41
La signifo de la nova Laborplano de UEA. <i>Lapenna</i>	170
La unua kunsido de la Estraro en la Nova Domo de UEA	81
Nia lingvo kaj nia literaturo. <i>Auld</i> . . .	205
Novjara saluto. <i>Holmes</i>	1
Omaĝe al Prof. Edmond Privat	169
Post Kopenhago — Frostavallen. <i>Lapenna</i>	61
Universalaj Kongresoj. <i>Pompilio</i>	101

DIVERSAĴOJ

Kirila alfabeto	220
Krucvortenigmo	113, 140

KONGRESA RAPORTARO DE LA 47a U.K.

Aliaj eventoj	159
-------------------------	-----

Dumkongresaj laboroj de la Komitato kaj Estraro de UEA	156
Festparolado	146
Internacia Somera Universitato	161
Kunvenoj de Fakaj kaj Neneŭtralaj Orga- nizaĵoj	158
La Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA	150
La Solena Fermo	162
La Solena Inaŭguro	149
Premioj kaj Diplomoj	154
Teatraj eventoj	152
Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco	161

LA JUNA VIVO

Aŭstrujo	89
Bonega informado	201
19-a TEJO-kongreso	217
18a IJK de TEJO	178
Dum la Junulara Festivalo	201
El Polujo	56, 89, 114
En 1962 neniue lando sen junulara sekcio !	15
Esperanto en lernejo de Bulgarujo . . .	56
Interurba junularrenkonto en Aŭstrio . .	137
Jarkunveno de JEB	137
Junulara Laborbrigado	218
Junulara literatura konkurso	218
Konkludoj de la 5a Internacia Seminario de GEJ	35, 56
Krucvortenigmo	57, 89, 201
Laborbrigado kaj ekspedicia roto en Jugoslavio	201
La juna verda flago sur la sabla strando .	178
La IIIa Tutlanda Balo de BEJ en Ruse . .	114
Novajoj de la Internacia Junulara Kongreso en Ystad	137
Nova sekcio en fora oriento	218
8a Internacia Skiferio	137, 179
Parolas la leganto	114
Raporto el Hispanujo	57, 89
Roma renkontiĝo de popolaj universitatoj	201
7a Internacia Skiferio de TEJO	56
TEJO-sekcioj kaj grupoj, raportu ! . . .	89
Ystad-prezentado de la TEJO-kongresa urbo	74

NOVAJ LIBROJ

Belarto 2	134
---------------------	-----

Ĉina antologio	32
Esperanto en komerco	95
Facilaj legaĵoj	198
Karpetoj transsaltis la drakpordon	95
Kiamaniere distingi la fungojn?	134
Knabino kaj garolo	95
Kredo, floroj, dinamito. Ernst Olsson	96
La okcidenta ĉambro. <i>Hong Zeng-ling</i>	95
Laŭdezira kalkulo de Kennedy	95
La verda raketo. <i>Jean Forge</i>	52
La Zamenhofa Esperanto	50
Omaĝo al Gaston Waringhien	51
Ombroj de la kvara dimensio. <i>Edwin de Kock</i>	94
Perfekteco de la esperantaj verboj. <i>L. Mimó</i>	93
Pri praktiko. <i>Maŭ Zedong</i>	95
Proverbaro esperanta. <i>Zamenhof</i>	197
Rakontoj pri fantom-spitantoj	95
Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio	95
Reeĥoj	94
Vivu Leninismo	95

POEZIO

Antaŭmaja nokto. <i>Filip</i>	71
D-ro Zamenhof-parko. <i>de Jong</i>	213
Irisa. <i>Perk</i>	14
Junia pluvo. <i>Samyn</i>	15
Kongreso. <i>Avoto</i>	213
La klifoj ĉe Dover. <i>Wergeland</i>	107
La Luziado. <i>De Camões</i>	176
Memoremo. <i>Brontë</i>	136

PROZO LITERATURA

Kiel mi eniris parnason. <i>Váňa Vladimir</i>	105
La kokinejo. <i>Samyn</i>	129

TRA LA MONDO

Argentino	115,	216
Aŭstralio	75	
Aŭstrujo	37, 58, 96, 115, 140,	184
Belgujo	96, 115, 139, 140,	216
Brazilo	75, 115, 184,	202
Britujo 18, 37, 58, 76, 96, 115, 184,		216
Bulgarujo	202	
Cejlono	184,	216
Ĉeĥoslovakio	34, 58, 76, 96, 184,	202

Ĉinujo	140
Danlando	37, 184, 216
Finnlando	115
Francujo 18, 37, 38, 46, 58, 76, 97,	115, 140, 184, 202, 216
Germanujo 16, 18, 76, 96, 141, 184,	102
Grekujo	97, 115, 141, 184
Hispanujo 37, 58, 76, 115, 141, 186,	202
Hungarujo	97, 141, 186, 203
Israelo	18, 76
Italujo	38, 55, 59, 141, 186, 203
Japanujo	141, 203
Jugoslavio	37, 97, 186
Kanado	116, 142
Madagaskaro	186, 216
Nederlando 19, 55, 59, 97, 116, 130, 142, 187,	216
Norvegujo	178
Pollando	19, 142, 187, 216
Portugalujo	76, 116
Sovetunio	19, 77, 116, 187
Svedujo	77, 117, 142, 203
Svislando	77, 97
Usono 19, 34, 38, 77, 117, 187, 203,	217

RUBRIKOJ

Esperantista vivo 18, 38, 60, 64, 97, 117, 142, 203,	217
Graĵnoj en vento	92, 111
La Internaciaj Konkursoj 5, 33, 46, 64, 90, 102, 164,	199
La Lingva Ĥaoso	91, 209
Nekrologo 38, 60, 78, 97, 117, 142, 203,	217
Nia forumo	36, 109, 140, 183, 198, 215
Oficiala Informilo 19, 39, 60, 78, 98, 118,	142, 165, 187, 204, 222
Radio 17, 36, 60, 80, 120, 144, 188,	219
Radio-kaj T.V.-Babiloj	199
Ricevitaj Libroj 36, 46, 64, 91, 111, 180, 202,	213
Ŝaka Rubriko 16, 52, 90, 104, 131, 175, 200,	220

UNIVERSALAJ KONGRESOJ

48a U.K.	183, 204, 219
47a U.K. 17, 38, 74, 75, 97, 117,	145—162
50a U.K.	13, 73

esperanto

JANUARO 1962

55 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 674 - (1)

Fondinto : H. HOLDER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Ewa Lutogniewska, 14-jara parolistino de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio, konata al la aŭskultantoj kiel "Plastuleto" (vd. p. 10).

Enhavo

Novjara saluto	1
Diktaĵo	1
CED kaj ĝia laboro (okaze de la 10-jara datreveno de la fondiĝo)	2
La unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj	6
Iom pri ni danoj	7
La nova domo de UEA	9
"Per flugiloj de facila vento"	10
Irisa. Jacques Perk	14
Junia pluvo. Albert Samyn	15
Geografia Semajno en Odense, Danujo .	16
Esperanto kaj stenografio	17
Rubrikoj	
La Internaciaj Konkursoj	5
La Juna Vivo	15
Ŝaka rubriko	16
Radio	17
47a Universala Kongreso	17
Esperantista Vivo	18
Tra la mondo	18
Oficiala Informilo	19

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

NOVJARA SALUTO

Denove, tute neatendite, al mi falas la agrabla kaj enviinda tasko dissendi novjaran saluton al esperantistoj ĉie kaj esprimi bondezirojn por la sukceso de iliaj klopodoj disvastigi la uzadon de Esperanto.

Miaj salutoj atingis vin en la vintra nordo, la somera sudo, en la tropiko kaj en diversaj paradizoj de ridetanta naturo.

Tia vera tutmondeco ne nur terene sed ankaŭ socitavole estas unika al Esperanto. Ĉi tio kaj la sepdekkvin jaroj de publika ekzistado de Esperanto montras ke ĝiaj fortaj kaj diversspecaj malamikoj, spite ĉian eblan avantaĝon je sia dispono, ne sukcesis mortigi ĝin.

Male, diversloke, rapide etendiĝas la uzo de Esperanto, sed pro ekonomiaj kaj aliaj bariloj ne eblas al ni, kiel organizaĵo, efike utiligi tion aŭ ricevi materialan subtenon pro ĝi. Des pli gravas ke, private, esperantistoj multe profitu la eblecojn pli kaj pli uzi la lingvon internacie ĉu skribe ĉu parole, ĉar per sonbendo la parolita letero ekstra-plezurige povas vojaĝi. La privatulon celas ankaŭ esperantistaj radio-elsendoj. Internacia lingvo vaste uzata, eĉ se nur private, allogas atenton en devige dividita mondo.

Ne konvenas ke ni faru apartan mondan kampanjon pri la sepdekkvinjara jubileo pro la nelonge pasintaj jubileoj sepdekjara de Esperanto, kvindekjara de U.E.A., kaj la Zamenhofa Jaro. Sed ni esperas ke lokaj grupoj kaj landaj asocioj utiligos la okazon por intensigi sian informadon pri Esperanto. Por helpi tion, C.E.D. eldonos specialajn dokumentojn.

Mencio de C.E.D. pensigas min pri la deka datreveno de ĝia fondiĝo pri kio mi plej intime sentas ĉar en mia domo Prof. D-ro Lapenna planis kaj preparis ĝin.

En postmilita mondo regata de specialistoj nur la plej aŭtentikigitaj faktoj povas helpi defendi la lingvon kaj respondi kaj eĉ ataki ĝiajn atakintojn. La tasko kolekti la faktojn el la vasta mondo, taksi, prilabori kaj taŭge prezenti ilin, normale postulus la dungon de altpagitaj profesiuloj kaj uzadon de grandaj rimedoj. Ĉi tio ne eblas al ni. Tamen, ne nur Esperanton mem, sed la decidajn paŝojn kiuj ebligis ĝian pluan ekzistadon, tre ofte ni ŝuldas al dediĉitaj unuopuloj kiuj je la momento de bezonego prenis sur sin la respondecon. La hazardo ke Prof. D-ro Lapenna troviĝis en Anglujo kaj povis honorofice entrepreni la taskon kaj inspiri internacian aron de kunlaborantoj helpi lin, provizis al ni institucion kiu gajnis mondan reputacion por fidinda kaj objektiva informo. Li faris nekalkuleble grandan oferon de tempo kaj energio kaj tio plus lia elstara talento kaj kapablo donis al Esperanto la prestiĝon kiun la genieco de la lingvo meritas sed kiun la movado ankoraŭ ne lernis plene ekspluati.

Mi povas nur mencii la promesplenan lernejan situacion kaj la domon ĵus aĉetitan de U.E.A. en Roterdamo, sed mi devas pli pritrakti la bedaŭrindan mankon inter ni de Afrikanoj. Elspezo de nia tuta havaĵo ne ebligus al ni fari eĉ brueton pri Esperanto en nur unu el la novaj landoj de Afriko. Ni do klopodas klarigi al Afrikaj studentoj en Eŭropaj universitatoj per dokumento preparita de Tibor Sekelj, kiel Esperanto povus plej efike solvi ilian lingvan problemon kaj samtempe enigi iliajn popolojn en internacian kaj amikan rondon. Spite la financajn malfacilaĵojn ni ankaŭ esploras la eblecon de surterena agado en Afriko kaj Azio.

Iun ajn tagon, cirkonstancoj povos devigi mondajn aŭtoritatojn pripensi internacian lingvon. Harmonia kunlaboro en 1962 estas nepara por la sukceso de Esperanto.

H. W. Holmes

DIKTAĴO

Siatempo, kiam mi decidiĝis lerni Esperanton, mi faris tion, ĉar mi absolute fidis, ke ĝi estas vivanta, plenvalora, unueca lingvo kaj, kiel tia, prezentas la solvon de la lingva problemo en la mondo.

La unua Esperantista konferenco, kiun mi partoprenis, okazis en Zidani Most. Ni du — kolego mia kaj mi — veturis tien por reprezenti la ĵus fonditan klubon en la Universitato de Zagreb. Ni estis komencantoj. Kaj "komencanto" signifis tiam — espereble ankaŭ nun — en Jugoslavio, ke la koncerna persono ne lernis la lingvon pli ol 6-7 monatojn! En la vagonaro — ĝis hodiaŭ mi vivece rememoras la bildon — ni preparadis niajn planitajn intervenojn kun la gramatiko kaj la vortaro en la manoj. Ni estus hontintaj veni eĉ al la nura ideo, ke nia nesufiĉa lingvoscio povus rajtigi nin paroli nacilingve. Kaj, se ni efektive estus havintaj tiel absurdajn postulojn, certe neniu pretus kontentigi ilin. Paroli internacilingve inter esperantistoj estis nek ordono, nek perforte altrudita regulo. Tio tute simple estis normala kaj nediskutebla kutimo. Ĝi kaŭzis, ke mi restis esperantisto: la lingvo efektive montriĝis vivanta.

Sekvis legado ĉiaspeca: tradukoj kaj originalaj verkoj, revuoj, gazetoj. Certe, ne ĉio estis perfekta. Ekzistis ankaŭ mezaĵoj kaj eĉ tute senvaloraj eroj, kiel, cetere, en kiu ajn literatura lingvo. Tamen, la plej granda parto havis sendubajn artajn kvalitojn. Ĝi estis la dua kaŭzo, pro kiu mi restis esperantisto: mi ellernis ne sensangan kodon, sed alte nuancitan, plenvaloran kulturan lingvon.

Post nelonge mi ĉeestis la unuan fojon universalan kongreson. Tiam mi mem povis konstati, ke la lingvo, kiun mi trovis en la legitaj libroj kaj periodaĵoj, kaj kiun mi normale praktikis en mia klubo kaj ekster ĝi en konversacioj kun esperantistoj, estas vere monde internacia kaj vivanta.

La tri esencaj valoroj de Esperanto, skize prezentitaj en la lumo de personaj spertoj, estas la veraj kaŭzoj de ĉiuj realaj kaj daŭraj sukcesoj, kiujn atingis kaj plue atingas la Internacia Lingvo. Ili estas tiel nedisigeble ligitaj unu al la alia, ke sen nur unu el la tri, la du aliaj ankaŭ malaperas. Tial, malobservi strukturan regulon de la lingvo laŭ la Fundamento, malatenti ĝian vivantecon en niaj organizaĵoj, aŭ senkritike ataki la Esperantan literaturon kiel tian (tute egale ĉu originalan aŭ tradukan), signifas efektive atenci la lingvon mem. Necesas ne nur atentigi pri tiu danĝero, sed ankaŭ tuj elradikigi ĝin per la komunaj fortoj de ĉiuj sinceraj, kleraj kaj klarvidaj esperantistoj. Ĝi estas diktaĵo de la logiko entenata en la nocio mem de "lingvo internacia".

I. L.

C.E.D. KAJ ĜIA LABORO

okaze de la

10-JARA DATREVENO DE LA FONDIĜO

En la januara numero de "Esperanto", 1952, aperis informo pri la fondiĝo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. En artikolo, kiu klarigis la celojn de la ĵus organizita nova institucio, estis, interalie, dirite :

"En sia pli ol 60-jara ekzistado la Esperanto-Movado montris admirindan vivkapablon. Ĝin ne detruis la skismo, nek la du grandaj mondmilitoj, nek diversaj tiranecaj reĝimoj, nek la kontraŭstaro de gravaj aŭtoritatoj, nek — ni estu sinceraj al ni mem — tre ofte niaj propraj eraroj. Batita kaj terenĵetita, ĝi ĉiam trovis forton por releviĝi; ignorata, ĝi ĉiam sukcesis denove aŭdigi sian voĉon; forlasata de siaj adeptoj, ĝi ĉiam akiris novajn entuziasmajn batalantojn. Granda ideo kaj nobla idealo, por kiu oni oferadis, por kiu oni suferadis, por kiu oni eĉ mortadis ! . . . Movado, kies vojo al la altaj celoj estas markata eĉ per sango de martiroj, tia movado tute certe ne povas pereii. Sed inter ne pereii kaj venki estas diferenco. Kaj ni volas ne nur ne pereii. Ni ankaŭ volas definitive venkigi la aferon. Por atingi tion, oni devas aldoni ankoraŭ multe da scio kaj da energio al la jam ekzistantaj vervo kaj entuziasmo. Tiun truon klopodos plenigi — kun la helpo de ĉiuj, kompreneble — la ĵus fondita Centro de Esploro kaj Dokumentado."

De tiam pasis 10 jaroj. La tri literoj — C.E.D. — fariĝis jam vaste konataj en la Esperanto-Movado kaj respektataj en multaj medioj ekster ĝi. Tamen, malmultaj esperantistoj precize scias, kio estas la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kiel ĝi estas organizita kaj kion ĝi faras. Kelkfoje oni ankaŭ ne komprenas, ke C.E.D. estas unu afero, dum la Informa Fakto de U.E.A. estas tute alia afero, kvankam la laboroj de C.E.D. ne malofte liveris al la monda informado utilajn materialojn.

Fondiĝo kaj Organizo

Post plurmonataj antaŭpreparoj en la hejmo de Gesinoroj Nora kaj Harry Holmes, kiuj ankaŭ kontribuis la unuan donacon de 20 pundoj, C.E.D. ekfunkciis la 1-an de januaro 1952. En tiu tago — kaj dum kelkaj postaj jaroj — la oficejo de C.E.D. troviĝis en malgranda subtegmenta ĉambro en 300, West End Lane, Londono, N.W. 6. En tiu tempo ĝia tuta ilaro konsistis el unu skribmaŝino, kelkaj dosieroj kaj slipoj, iom da skribpapero. Ekde novembro 1955 C.E.D. troviĝas en 77, Grasmere Avenue, Wembley, je 20 minutoj per subtera fervojo de la centro de Londono. Ĝia oficejo certe ne estas luksa, sed luma, plaĉa kaj komforta. Moderna

oficeja ilaro ebligas senĝenan funkciadon.

La celo kaj laborsistemo de C.E.D. ne estis formulitaj en aparta statuto aŭ regularo, sed en speciala dokumento, kiu enhavis la bazajn principojn de agado kaj montris la celojn atingotajn. Ekde la komenco la organizo estis intence establita kiel tre elasta, sen rigidaj reguloj, administraj komplikajoj, formalaj kunsidoj kaj kunvenoj, kiuj nur bremsus la efikecon kaj la dinamismon. La ideo estis kaj plue estas havigi al la Movado por la Internacia Lingvo elstaran institucion kun kvalifikitaj kunlaborantoj, kiu, unuflanke, kolektos ĉiaspecan dokumentan materialon pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, kaj, aliflanke, utiligos tiun materialon por apogi ĉiujn klopodojn celantajn vastigi la uzon kaj la praktikajn aplikojn de la Internacia Lingvo.

La organiza strukturo estas tre simpla : direktoro, nomata de la Komitato de U.E.A., kunlaborantoj kaj tradukantoj, sekretariino. Kunlaboranto povas fariĝi nur persono alte kvalifikita kaj kompetenta por difinita tasko, laŭ la invito de la direktoro. La kunlaborantoj plenigas kaj subskribas apartan slipon, en kiu troviĝas, interalie, indikoj pri la profesio kaj okupo, specialeco, universitataj titoloj, sciencaj gradoj kaj fakaj distingoj, hejma lingvo, personaj rilatoj en sciencaj, artaj, politikaj, komercaj kaj aliaj medioj, aparteno al gravaj naciaj aŭ internaciaj organizaĵoj, ligoj kun nacilingvaj fakaj revuoj kaj gazetoj. En la slipo troviĝas aparta rubriko, en kiu la kunlaboranto indikas, post interkonsiliĝo kun la direktoro, kiujn laborojn li aŭ ŝi estas preta plenumi por C.E.D. Tiamaniere en la oficejo oni havas precizan superrigardon ne nur pri la kunlaborantoj, sed ankaŭ pri ĉiuj aliaj necesaj elementoj. En ĉiu momento la direktoro povas sin turni precize al tiu aŭ tiuj kunlaborantoj, kiuj povas plej bone plenumi la konkretan bezonatan laboron. La samo koncernas la getradukantojn por la diversaj lingvoj. Kun la escepto de la sekretariino, kiu estas salajrata oficistino de U.E.A., ĉiuj aliaj personoj, laborantaj por C.E.D. en kiu ajn funkcio, plenumas siajn devojn sen kompenso. Neniun oni en kiu ajn senco devigas fariĝi kunlaboranto, sed se iu akceptas la

proponon, oni atendas, ke li plenumos ĝin precize kaj ĝustatempe, Kaj tiel efektive okazas.

La nuna buĝeto de C.E.D. turniĝas ĉ. 700 anglaj pundoj jare. Tiu sumo inkluzivas la salajron de la sekretariino, ĉiujn oficejajn elspezojn, eldonadon de dokumentoj kaj aliajn elspezojn ligitajn al la laboro de C.E.D.

La nombro de kunlaborantoj en la 10-jara periodo variis inter 25 kaj 100. Ne estas eble ne memori kun dankemo la nomojn de eminentaj forpasintaj sciencistoj, kiuj multe helpis al la laboro de C.E.D. per siaj elstaraj kontribuoj: Prof. D-ro G. Canuto, Prof. J. C. Flugel, Ing. E. François, Prof. St. Kamarýt, Prof. D-ro H. Sirk. Kelkaj aliaj pro diversaj kaŭzoj ĉesis kunlabori, sed ilin anstataŭigis novaj fortoj. Fine de 1961 C.E.D. konsistas el la direktoro, sekretariino kaj 82 kunlaborantoj en 22 landoj.

Studoj kaj Dokumenta Materialo

La dokumenta materialo, kiun kolektas C.E.D., konsistas el speciale verkitaj studoj de diversaj kunlaborantoj, enketoj kaj statistikoj, esploroj pri specialaj temoj, bibliografioj, informoj pri ĉiuj aspektoj de la internacilingva problemo. Jen la ĉefaj rezultoj atingitaj sur tiu ĉi kampo:

(1) *Studoj*: Entute la kunlaborantoj de C.E.D. verkis 63 specialajn studojn, kiuj rilatis al multaj temoj: de la lingva problemo en Eŭropo aŭ Afriko ĝis la teknikaj kaj sciencaj terminaroj.

(2) *Enketoj kaj Statistikoj*: Estas farita tuta aro da enketoj kaj statistikoj, el kiuj aparte menciindaj estas la granda statistiko pri la nombro de esperantistoj (1952), la enketo pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado, la enketo pri la socia konsisto de la universalaj kongresoj, la enketo pri la Esperantaj libroj en publikaj bibliotekoj, tri grandaj enketoj pri la instruado de Esperanto en lernejoj, enketo pri la Esperanto-societoj, enketo pri Esperantlingvaj resumoj kaj artikoloj en nacilingvaj revuoj, statistikoj pri la Esperantaj radioelsendoj, pri Esperantistoj-eminentuloj, pri Esperantlingvaj prospektoj kaj reklamoj, pri stratoj kaj placoj kun la nomoj "Esperanto" aŭ "Doktoro Zamenhof" ktp.

(3) *Bibliografioj*: Ĉiujare estas ellaborata Bibliografio pri la Esperanto-publikaĵoj. Pluraj kunlaborantoj ellaboris specialajn bibliografiojn pri

publikaĵoj rilate la Internacian Lingvon en siaj respektivaj landoj.

(4) *Dokumenta Materialo*: Ĉiuj dokumentoj kaj informoj, kiuj povus en kiu ajn senco helpi al la laboro de C.E.D., estas regule kolektataj kaj registrataj en aparta sliparo. Ĝis la fino de 1961 estis tiamaniere kolektitaj, ordigitaj kaj registritaj entute 1.736 dokumentoj. En la oficejo estas, krome, legataj ĉiuj Esperanto-gazetoj kaj revuoj, kaj pluraj nacilingvaj fakaj revuoj. Plue estas trarigardataj ĉiusemajne diversaj publikaĵoj kaj dokumentoj de U.N.E.S.C.O., U.N. kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. Artikoloj aŭ informoj en la menciitaj publikaĵoj, kiuj povus esti utilaj por la laboro de C.E.D., estas same tiel registrataj en la sliparo.

Tiamaniere la sliparo entenas ĝis nun pli ol 10.000 enskribojn. Tiu temporbato, sed nepre neceso, sistema laboro ebligas trovi ĉiujn bezonatajn aŭ utilajn informojn kaj dokumentojn pri difinita temo. Estas malfacile prezenti la riĉecon de la enhavo de tiu dokumenta materialo. Sufiĉos eble diri, ke la sliparo rilatas al ĉiuj aspektoj de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj de la, ni diru, kostoj de multlingveco ĝis la internaciaj Esperantaj infankongresoj, aŭ en la aboca vicordo, de Afriko ĝis Zanzibaro!

Publikaĵoj

Kompreneble, C.E.D. ne limigis sian laboron al la nura kolektado de studoj kaj dokumentaj ma-

terialoj, sed utiligis kaj plue ĉiam pli amplekse utiligas tiujn gravajn fontojn por siaj publikaĵoj. La ĉefa konstanta publikaĵo de C.E.D. estas la *Dokumentaro pri la Internacia Lingvo Esperanto*. La dokumentoj estas eldonataj laŭ la Ĝenerala Plano, ellaborita komence de 1952. Laŭ tiu plano, ĉiuj dokumentoj eldonitaj por la internaj bezonoj de la Esperanto-Movado havas la signon CED/INT. Entute en tiu serio estas eldonitaj 20 dokumentoj. Ĉiuj dokumentoj, eldonitaj por specialaj okazoj, havas la signon CED (por la Esperantaj eldonoj) aŭ RDC (por la lingvoj angla kaj franca). En tiu serio estas entute eldonitaj 11 grandaj dokumentoj, plejparte kun presita kovrilo, en la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, pluraj ankaŭ en la itala, dana, nederlanda, germana, sveda, norvega, portugala, pola kaj aliaj lingvoj. Aparte menciindaj estas la Dok. CED/3 eldonita okaze de



La aganta prezidanto de U.E.A., S-ro H. W. Holmes, kaj la Estrarano pri kulturaj aferoj, S-ro N. R. Smith, interesiĝas pri la evoluo de la laboro de C.E.D.

la UNESKO-Konferenco en Parizo, CED/4 publikita okaze de la UNESKO-Konferenco en Montevideo, CED/5 okaze de la 70-jara datreveno de Esperanto, tri dokumentoj CED/6 okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

La nombro de aliaj dokumentoj laŭ la serioj estas :

Serio A. (La Internacia Lingvo Esperanto) entute 21 dokumentoj en 7 sekcioj;

Serio B. (La Instruado de Esperanto) entute 12 dokumentoj en 4 sekcioj;

Serio C. (La Monda Organizo de la Esperanto-Movado) entute 11 dokumentoj en 6 sekcioj;

Serio D. (La Esperanta Literaturo) entute 15 dokumentoj en 4 sekcioj;

Serio E. (La Esperanta Faka kaj Scienca Literaturo) entute 3 dokumentoj;

Serio F. (La Esperantaj Revuoj kaj Gazetoj) entute 3 dokumentoj;

Serio G. (Kulturaj Manifestacioj en aŭ per Esperanto) entute 26 dokumentoj en 6 sekcioj;


Serio H. (Diversaj Formoj de Praktika Aplikado de Esperanto) entute 4 dokumentoj en 2 sekcioj;

Serio I. (La Rolo de Esperanto por Evoluigo de Internacia Solidareco) entute 21 dokumentoj en 7 sekcioj;

Serio J. (La Rolo de Esperanto por Faciligo de Internaciaj Politikaj, Profesiaj, Fakaj kaj Aliaj Rilatoj) entute 3 dokumentoj en 2 sekcioj.

Entute, do, C.E.D. eldonis 150 dokumentojn, el kiuj multaj havis po 10, 15 aŭ eĉ 20 dense tajpitaj paĝoj.

La dokumentoj de C.E.D. estas regule sendataj al diversaj interŝtataj kaj privataj internaciaj organizaĵoj, al la plej gravaj bibliotekoj, al pluraj



Sranko kun la studoj de la kunlaborantoj kaj la ordigitaj dokumentaj materialoj



Parto de la nuna oficejo de C.E.D.

sciencaj institutoj kaj institucioj. Kelkaj el la dokumentoj de C.E.D., precipe tiuj en la Serio CED (RDC), estis eldonitaj en pluraj dekmiloj da ekzempleroj. Multaj el la dokumentoj de C.E.D. aperis en mallongigita formo en diversaj aliaj naciaj lingvoj nemenciitaj supre, kelkfoje eĉ sen indiko ke ili estis liveritaj de C.E.D. Ofte la dokumentoj servis kiel bazo por verkado de nacilingvaj studoj kaj artikoloj.

Estas necese aldoni, ke en kelkaj kazoj C.E.D. verkis apartajn dokumentojn aŭ studojn, kiuj ne estis publikigitaj, sed liveritaj al la koncerna interesita instanco. El tiuj sendube la plej grava estas la speciala *Raporto pri la Internacia Lingvo Esperanto*, verkita en 1953 kaj liverita al la Sekretariato de UNESKO kelkajn monatojn antaŭ la Konferenco en Montevideo. Nur tiu Raporto havis 50 dense tajpitajn paĝojn kaj pli ol 200 paĝojn da aldonaj dokumentoj kaj statistikaj tabeloj. Tiu grava dokumento estis poste parte utiligita por kunmeto de la Raporto de la Sekretariato al la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo.

El la aliaj eldonaĵoj de C.E.D. estas menciinda la verko *La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto*, eldonita en 1954. Plia grava eldonaĵo de C.E.D. estas *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro* kun multaj kontribuoj de kunlaborantoj de C.E.D., publikigita en 1960. Artikoloj de trideko da kunlaborantoj de C.E.D., verkitaj por specialaj okazoj — ekzemple okaze de la Zamenhof-Jaro — aperis ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en granda nombro da naciaj lingvoj, entute en pluraj centmiloj da ekzempleroj.

Aliaj Laboroj

C.E.D. plenumas ankaŭ aliajn laborojn depende de la konkretaj bezonoj. Ĝi, ekzemple, kolektis la

materialojn kaj organizis la tutan Universalan Ekspozicion, kiu estis unue elmontrita en Montevideo okaze de la UNESKO-Konferenco kaj certe estis unu el la faktoroj de la sukceso kronita per la Rezolucio de la 10-a de decembro 1954. La sama Ekspozicio estis poste elmontrita en Strasburgo, Kopenhago, Majenco, Varsovio, Nederlando kaj parte ankaŭ en Harrogate. Ĉie ĝi estis efika pruvo pri la kulturaj valoroj kreitaj en la Internacia Lingvo. La materialoj de la Ekspozicio nun troviĝas en la Domo de U.E.A. en Rotterdam kaj ili estas daŭre kompletigataj. Ankaŭ ĉi-okaze la eldonejoj de Esperantaj libroj estas petataj liveri po unu ekzemplero de ĉiu publikaĵo al la C.O. de U.E.A. en Rotterdam por la Ekspozicio. C.E.D. liveras al UNESKO precizajn informojn pri la traduka Esperanto-literaturo kaj tiuj informoj estis kaj plue estas utiligataj por la gravega verko *Index Translationum*. Baldaŭ C.E.D. eldonos verkon sub la titolo *Bibliografio de la Internacia Lingvo*. Menciinda estas ankaŭ la Foto-Servo, kiu havigis al C.E.D. konsiderindan nombron da bonaj fotoj ilustrantaj ne nur diversajn aspektojn de la praktikaj aplikoj de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ multajn formojn de la lingvo-problemo en la internaciaj rilatoj. La plano estas eldoni iam libron de fotoreproduktaĵoj kun tre mallongaj klarigaj tekstoj en Esperanto kaj kelkaj naciaj lingvoj kun la celo bilde prezenti la lingvajn malfacilaĵojn kaj la solvon per la Internacia Lingvo.

Tiamaniere C.E.D. per sia regula kaj konstanta agado estis tutcerte unu el la ĉefaj elementoj, kiuj ebligis la firmigon de la pozicioj de la Internacia Lingvo en diversaj sciencaj kaj ĝenerale kulturaj centroj de la mondo en la lastaj jaroj. Krom tio, C.E.D. ĉiam estis kaj estas je dispono de la Esperanto-Movado por apogi per dokumentitaj pruvoj kaj argumentoj konkretajn agadojn. Ankaŭ en la nuna granda klopodo por enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn C.E.D. plenumas sian utilan rolon. En 1962, okaze de la 75-jara datreveno de Esperanto, C.E.D. eldonos, krom la dokumentoj en la menciitaj serioj A-J, ankaŭ kelkajn gravajn dokumentojn en la Serio CED (RDC). Tutcerte en tiu Serio aperos longa studo pri *Esperanto kiel Literatura Lingvo* de W.Auld; studo pri *Sciencaj, Teknikaj kaj Aliaj Fakvortaroj* de Ing. R. Haferkorn; dokumento kun *Eldiroj de Mondfame Konataj Personecoj pri la Valoro kaj Signifo de Esperanto*, redaktota de la direktoro; fine, broŝuro sub la titolo *Sepdek Kvin Jaroj de la Internacia Lingvo*, verkota de la direktoro.



Tiun tutan plej koncize skizitan laboron C.E.D. plenumas per vere minimumaj financaj rimedoj. Parton de la elspezoj havigas U.E.A. kaj parton kontribuas sindonaj esperantistoj en formo de donacoj. Ne estas eble mencii ĉiujn donacintojn de la pasintaj 10 jaroj. Iliaj nomoj estis kaj estas regule publikigataj en la revuo "Esperanto". Ta-

men, okaze de tiu ĉi dekjara datreveno, estu menciitaj almenaŭ la nomoj de la unuaj donacintoj, krom Gesinjoroj Holmes. Ili estas: Novzelanda Esperanto-Asocio, Londona Esperanto-Klubo, S-ro D. Kennedy, S-ro C. Thollet, F-ino Skeate, S-ro J. M. B. el Glasgovo, S-ro E. C. S. el Britujo, S-ro R. Schwartz kaj J. Dissausoy el Parizo, F-ino M. Vermaas, Centra Dana Esp. Ligo, Gesinjoroj Laurie, D-ro I. L. kaj aliaj. Al ili kaj al ĉiuj aliaj, kiuj finance helpis C.E.D. dum la pasintaj 10 jaroj, same kiel al ĉiuj kunlaborantoj, tradukantoj kaj helpantoj tutkoran kaj varman dankon!

Kvankam la laboro de C.E.D. estas kontentiga, tamen tiu nia institucio povus evoluigi ankoraŭ multe pli vastan aktivecon, se ĝi disponus pri pli grandaj financaj rimedoj. Eble la legantoj — ĉiuj legantoj — de tiuj ĉi linioj komprenos tion kaj agos konforme. Eble inter ili eĉ troviĝos unu aŭ pluraj vere bonstataj kaj komprenemaj esperantistoj, kiuj subvencios la laboron de C.E.D. per tia sumo, kiu efektive ebligos al ĝi disvolvi plene ĉiujn siajn fortojn en la sekvantaj jaroj.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Direktoro de C.E.D.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2860	3265	114,16
2.	Finnlando	2515	2525	100,40
3.	Britujo	6688	6661	99,60
4.	Hispanujo	2585	2557	98,92
5.	Svedujo	6325	6190	97,87
6.	Danlando	3002	2871	95,64
7.	Belgujo	2121	2006	94,58
8.	Svislando	2120	2003	94,48
9.	Germanujo	7490	7055	94,19
10.	Usono	3660	3440	93,99
11.	Italujo	4247	3835	90,30
12.	Francujo	7516	6754	89,86
13.	Nederlando	5716	4942	86,46
14.	Norvegujo	1993	1677	84,14
15.	Brazilo	5100	4097	80,33
16.	Jugoslavio	7150	5560	77,76

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Novzelando	965	1179	122,18
2.	Israelo	250	285	114,00
3.	Kanado	665	746	112,18
4.	Aŭstralio	1146	1148	100,17
5.	Portugalujo	535	515	96,26
6.	Aŭstrujo	1580	1440	91,14
7.	Madagaskaro	250	205	82,00
8.	Islando	250	205	82,00
9.	Urugvajo	250	165	66,00
10.	Argentino	960	505	52,60
11.	Sudafriko	375	175	46,67

LA UNUA INTERNACIA KONFERENCO ESPERANTA DE SCIENCISTOJ

okazos en Kopenhago lige al la Universala Kongreso.

La lingva problemo en la scienco estos la temo de speciala konferenco de esperantistaj sciencistoj, kiu laŭ ĵus farita decido sekve de interkonsento inter Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Scienca Asocio Esperantista okazos paralele al la 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago.

Ne estas necese atentigi al la esperantistaro pri la eksterordinara graveco de tiu ĉi decido. La lingva problemo en la scienco estas premega. La diverseco de lingvoj forrabas tempon kaj energion, perdigas milope eblojn de kontaktoj, lasas oftege neatentitaj sciencajn atingojn de neprivilegiitaj lingvoregionoj, malfaciligas rektan interŝanĝon de pensoj en internaciaj sciencaj konferencoj kaj kongresoj, kreas malklarecon, kie devus esti klareco — situacio katastrofe malkonforma al la spirito de la scienco, al la principa efikeco de ĝiaj labor-metodoj.

En Kopenhago oni dediĉos seriozan studadon al tiu ĉi problemo, kaj ni nun alvokas al ĉiuj esperantaj organizaĵoj kaj gazetoj kunlabori por diskonigi tiujn ĉi urĝajn informojn pri la okazigo de la konferenco. Al tiu ĉi konferenco estas kore invitataj ĉiuj sciencistoj, kiuj povas kaj volas serioze kontribui al la laboroj de la konferenco. Koncize la plano estas la jena:

La konferenco estas, kiel menciite, malfermita al ĉiuj sciencistoj, kiuj iel povas kontribui. Aliflanke, la laborkunsidoj de la konferenco estas — kiel ĝenerale estas tiaj sciencaj laborkonferencoj — fermitaj al nesciencistoj, nefakuloj. Ĉi tio tamen ne malebligas, ke speciale interesigantaj nefakuloj per antaŭa peto povas ricevi permeson ĉeesti kiel observantoj.

La konferenco konsistos el du partoj, sekve de la kunlaboro kun U.E.A. La unua parto estos la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, kiuj ĉi-jare direktiĝos al temoj rilatantaj al la celo de la konferenco, studo pri la lingva problemo en la scienco. Ili pritraktos tiun temon el la vidpunktoj de la diversaj fakoj, ne detaliĝante pri ĝeneralaĵoj jam bone konataj (ekz. ĝenerale priscitataj lingvaj malfacilaĵoj ĉe internaciaj konferencoj ktp.), sed koncentriĝante pri specifikaj lingvaj problemoj de la unuopaj sciencoj puraj kaj aplikataj. Ĉiuj prelegoj estos pretigitaj manuskripte, kaj la tuta materialo formos gravan parton diskutotan en la laborkunsidoj de la konferenco.

Alia parto de la studota materialo formiĝos per kontribuaĵoj preparitaj antaŭ la konferenco de sciencistoj-specialistoj. Pro la atendata amplekso de la materialo kaj la limigita tempo disponebla por la diskutado, tiuj kontribuaĵoj devas aperi en formo de mallongaj traktaĵoj, pli malpli kiel resumoj, tamen, se necese por la dokumentado, akompanataj de tabeloj, grafikaĵoj k.s. Tiuj kontribuaĵoj devas esti senditaj al Kopenhago antaŭ la konferenco, ĝis plej malfrue la 15. de junio, por povi esti multobligitaj kiel provizora raporto disdonota al la konferencanoj por pristudado.

La tuta materialo tiel kolektita estos diskutata en la laborkunsidoj de la konferenco. Ĉiuj prelegoj de la Internacia Somera Universitato okazos antaŭ ĵaŭdo de la kongresa semajno, la unuaj kunsidoj de la konferenco mem okazos verŝajne dum la tuta ĵaŭdo, plue dum kelkaj horoj de vendredo kaj la konkludiga kunsido sabaton posttagmeze.

Kiel ĉefa organizanto de la konferenco mi alvokas, mi ripetas, la kunlaboremmon de esperantaj organizaĵoj kaj gazetoj, ke ili bonvolu senprokraste diskonigi la supre donitajn vere urĝajn informojn pri la konferenco. Kaj en la nomo de Internacia Scienca Asocio Esperantista mi tutkore invitas sciencistojn esperantistajn kaj neesperantistajn partopreni en la studoj antaŭ la konferenco kaj en la konferenco mem... Ĉiuj, kiuj emas kunlabori kaj partopreni estas petataj skribi al la Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, per *aparta* letero temanta *nur* pri la aferoj de la konferenco kaj kun la jena indiko sur la koverto: *Scienca Konferenco*. Ili sciigu la eventualan precizan temon (kun ioma indiko pri la enhavo de la kontribuaĵo), kiun ili proponas por pritrakto en la konferenco.

La tuta materialo de la konferenco, la prelegoj, la ceteraj kontribuaĵoj kaj la referatoj de la diskutoj, estos kompilitaj en granda raporto, supozeble multobligita kun presita kovrilo, kiu estos publikigita per kunlaboro inter la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono. Supozeble la raporto aperos ankaŭ nacilingve.

Paul Neergaard

Organizanto de la Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj,
Vicprezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Prezidanto de LKK de la 47a
Universala Kongreso de Esperanto

Tom pri ni Danoj

Okaze de la Universala Kongreso 1962

Estas tradicio aperigi artikolon pri la venonta kongreslando. Ĉu io estas pli enuiga, por la aŭtoro kiel por la legantoj, ol legi tradician artikolon?

Ion vi ja devas scii pri la kongreslando, ion karakterizan. Legu refoje la unuajn tri liniojn (kaj tion, kio sekvas), kaj vi jam scias ion karakterizan ĉe la danoj. Tial la svedoj ŝatas viziti Kopenhagon. Ni ne observas tro rigide la formojn. Tial niaj gastoj fartas bone en nia societo. Mi estas certa, ke vi bone fartos en nia lando.

Ni havas reĝon en Danlando. Ne ĉiuj tion scias. Li estas bona kaj inteligenta homo, nur pintor-namaĵo, sed li scias direkti orkestron, kaj li faras domaĝon al neniu. Ni havas ĉefministron, kiu favoras Esperanton. La popolo vivas senzorge, ĉar ĝi ne okupas sin pri seriozaj problemoj. Ĝi lasas la pensadon al korifeoj diversspecaj. Kaj tiuj bonege pensas, almenaŭ tri aŭ kvar el ili. La ceteraj cerbumas, kion ili lernis de *Søren Kierkegaard*, kiu sciis kaj cerbumi kaj pensi. Oni trovas esceptojn kompreneble, ekzemple la esperantistojn escepte de kelkaj esceptoj.

Mi rekomendas al vi ne kunporti aŭtomobilojn, ĉar ne estas loko por ili sur la stratoj. Se vi ekskursas aŭtomobile sabate aŭ dimanĉe, vi ne revenos je la 20a horo, tiel kiel vi intencis, por rigardi la televidon, ĉar sur la enirstratoj de Kopenhago vi trovas vicon de aŭtoj je longeco de dek ĝis du dek kilometroj.

Eble estas tiu materia bonstato, kiu faras la danojn senzorgaj. Sed io tamen interesas nin: plialtigi la salajron! Tre ofte ni strikas. Ĉiu striko nome donas pli da mono al la poŝo, ĉar la registaro ĉiam cedas. Ĝi nome estas socialista, laborista, progresema. Tiaj estas ankaŭ la konservativuloj. Se ne pro la nomoj, oni ne povus distingi la du partiojn unu de la alia. En la parlamentejo oni disputas, sed ankaŭ la konservativuloj plialtigas la pension por maljunuloj — pro neceso kompreneble, ĉar se ne, ili malaperus kiel partio.

La gravaj homoj estas tiuj, kiuj havas oficialan postenon, pli gravaj estas la prezidantoj, vic-

prezidantoj kaj estraranoj en la 12345 diversspecaj societoj kaj kluboj en la lando, sed plej gravaj estas la anstataŭantoj.

Ion ni tamen lernis de *H. C. Andersen*, kun kiu vi espereble konatiĝos en la februara numero de nia revuo. Konatiĝos jes, scio pri nomo ne sufiĉas. Tiu artikolo estos pli serioza ol tiu ĉi, tamen memorante, ke seriozo sen ŝerco (almenaŭ interna) kaj ŝerco sen seriozo (kvankam kaŝita) estas nura banalaĵo. Hodiaŭ en nia lando, same kiel en aliaj landoj, ne troviĝas veraj verkistoj. Se ekzistas iu, li almenaŭ ne estas konata, ĉar danoj konsideras grandaj nur mortintojn. La saĝon ili scias enkaptigi nur kiel fabelojn, kiujn ili ne komprenas. Tial ni fieras, kaj prave, pri nia granda poeto.

Vivas *Niels Bohr*, kaj estas rekonita, sed li ja okupas sin pri atomfiziko, afero pli palpebla kaj pli komprenebla ol estas poetiko. La duona parto de la popolo estas artistoj, la cetera parto kritikistoj. Ni multe evoluis de la tempo de *Michelangelo* kaj *Bernini*. Rustiĝinta fero estas pli taŭga ol estas marmoro. Verkojn de "*Le grand danois*", *Robert Jacobsen*, vi vidos en ekspoziciejo "*Luciana*". Per malnoviĝinta fero li aĉetis belan kastelon en Francujo. Ĉu arto aŭ artismo? *Fidias* enkondukis la movon en la arton, kaj ĉar ni ĉiam admiris la grekan kulturon, ni eltrovis novan renesancon en la movarto.

Nia agrikulturo estas la plej progresinta en la mondo. Dum la pasintaj cent jaroj ni tamen instruis tiom al la cetera mondo, ke ni estas perdantaj nian pozicion. Sed tio estas vera progreso. Se aliaj nacioj farus simile, ni, la tuta homaro, atingus en daŭro de kelkaj jaroj rezultojn, kiuj sub la nunaj cirkonstancoj realiĝos nur post kvindek. Analfabetismo ekzistas nur en akademiaj rondoj, ni nomu prof. Blinkenberg.

Estas ja mia tasko allogi vin por nia kongreso. Eble ja iu aŭ alia kunportos poŝtmarkojn por UEA. Kun plezuro mi akceptos ilin en la kongresejo. En nia reĝa porcelanfabriko la virinoj povas aĉeti la plej mirindan porcelanon en la mondo — se oni

juĝas laŭ la kvanto, kiun aĉetadas la usonanoj. Ni danoj ne ĉiam povas, ĝuste ĉar la eksterlandanoj ĝin forprenas rekte de la fornoj. Kaj kion rekomendi al la sinjoroj? Jes, ne kunprenu la edzinon al la porcelanfabriko! Iru anstataŭe al "Nyhavn", la dana "Pigalle". Sed "Carlsberg" kaj "Tuborg" regalos vin tute senpage per la plej bona biero en la mondo. Plej bona en la mondo estas ankaŭ nia poŝtistaro. Viaj poŝtkartoj kun "La Marvirineto" atingos kiel fulmo la landlimon. Kio okazas post la limo, pri tio ĝi ne povas respondi.

Ĉarma estas Danlando, kaj ĉarma ĝia popolo. Vi povas sonorigi sur hazarda pordo, kaj tuj oni invitas vin trinki kafon kun kukoj. Nia plej alta monto estas "La Ĉielmonto". Franco iam iris por ĝin rigardi, sed ne vidis ĝin. Li iris duan fojon, sed ne trovis. Tiam alparolis lin dano: "Vi ja staras sur la monto!" Tiel nia lando estas plena de surprizoj.

En *Tivoli* vi amuziĝos. Tie ni aŭskultas koncertojn, dancas, ludas kaj trinkas. Infanoj kaj plenkreskuloj veturas en karuseloj kaj glitvagonaro. La junularo, kaj tiuj kiuj sentas sin junaj, amin-

dumas la knabinojn. Parenteze: niaj knabinoj, fraŭlinoj kaj sinjorinoj estas la plej belaj en la tuta mondo! Nenie en la mondo vi trovas pli ĉarman parkon ol *Tivoli*, kion asertas ankaŭ eksterlandanoj. Ĝian atmosferon kreis ni danoj. Cent milionoj da nedanoj tamen iomete kontribuis. En societo kun niaj esperantogastoj ni en aŭgusto ĝuos tiun mirindan lokon.

Ilustri mian artikolon per bildoj mi devus. Sed tiajn vi trovas en unua bulteno, kaj trovos en la dua. Mi preferas desegnaĵon de nia mondfama Bo Bojesen. Li donas al vi ion karakterizan pri nia lando, tion nome, ke neniu, eĉ ne la reĝo, povas esti sekura antaŭ la ŝercemo kaj satiro de la popolo. Tia socio ne povas tute pereji en miopo kaj stultfiero.

Fine, ni kore bonvenigas vin al U.K. en Kopenhago en aŭgusto. Ni faras ĉion ajn, por ke vi travivu la ĝis nun plej sukcesan kongreson. Kiel ĉio alia ankaŭ nia LKK estas la plej bona en la tuta mondo. Kompreneble ĝi laboregas por vi. Ni akceptos vin per malfermitaj brakoj.

Peter Zacho



"Movo en la arto" enpenetris ankaŭ la fakon de sinjorinaj frizistoj: — Sed mi diras al vi: Nenio kun rakedoj kaj vivaj kolomboj!
(Kliŝo: "Politiken".)

LA NOVA DOMO DE U.E.A.

Ĉiuj, kiuj ĉeestis la Solenan Fermon de la Universala Kongreso en Harrogate certe memoras, ke tiam la Ĝenerala Sekretario, Prof. Lapenna, komunikis, ke la Estraro decidis :

- a. aĉeti domon por la Centra Oficejo en Rotterdam je la sumo de 107.500 gld. (pro minacanta malkonstruo de la luita domo je Eendrachtsweg 7);
- b. nomi ĉambrojn en tiu domo laŭ la nomoj de tiuj, kiuj donacas por ĝi minimume 5000 gld.;
- c. enskribigi la nomojn de personoj, grupoj kaj aliaj instancoj, kiuj donacas por ĝia instalado minimume 50.- gld., en oran libron pri la domo.

Poste, ĉiuj membroj legis la decidojn en la septembra numero 1961 de la revuo Esperanto.

Koncerne a, mi povas informi vin, ke la 19-an de oktobro pasinta okazis la definitiva aĉeto ĉe notario. U.E.A. pagis la interkonsentitan sumon pere de la bonhavo en la Fondaĵo-Domo (34546,55 gld; vidu p. 30 de Jarlibro 1961, Dua Parto), per obligacioj de la Garantia Fondaĵo kaj per hipoteko de 55.000 gld je la domo.

Koncerne b, dum la Ferma Kunsido iuj ridis, kiam D-ro Lapenna klarigis la signifon de ĉambroj je nomo de persono, Esperanto-organizaĵo aŭ grupo, kiu donacos minimume 5000.- gld., aŭ je nomo elektita de la donacinto. Tia ĉambro en la domo poreterne portos tiun nomon. Sed — ĉu ridinde? Ĉu dube, ke tiaj donacontoj ekzistas? La domo havas 15 ĉambrojn. Estas supozeble, ke inter dekoj da landaj asocioj, miloj da grupoj kaj dek-miloj da esperantistoj ili estas troveblaj. Ĉar estas klare, ke U.E.A. bezonegas la monon. Ja al la aĉeto estis ligitaj ankaŭ kromkostoj; plue, estas kostoj de riparoj, plibonigoj kaj instalado; de bezonataj pliaj mebloj, maŝinoj kaj aliaj iloj; estos ĉiujaraj pago de rentumo kaj amortizo de la hipoteko. Finfine, U.E.A. devus disponi pri iom da mono por plenumi sian — daŭre pligrandiĝantan — taskon en la mondo kaj ne ĉiam esti minacata de ŝuldoj.

Tial la Estraro apelacias al tiuj esperantistoj, kiuj estas tiel feliĉaj ke ili havas pli grandan kapitalon ol la plimulto de la homoj en la mondo, kiuj estas riĉaj je materiaj havaĵoj, donaci por la domo la sumon de minimume 5000.- gld por unu ĉambro je sia nomo. Por sama celo oni povas ankaŭ testamenti tian sumon al U.E.A. — kvankam al ĉiuj niaj membroj ni varme deziras longan vivon! (Sur p. 52-53 de la Jarlibro 1961, Unua Parto, vidu kiel agi por testamenti al U.E.A. Se dezirate, mi volonte donos pliajn informojn).

Same, la Estraro apelacias al la landaj asocioj

kolekti inter siaj membroj la menciitan sumon por akiri ĉambron je la nomo de la koncerna lando.

Se vi, kiu legas ĉi tiujn liniojn, ĝojas pro la fakto, ke vi dum via vivo kontaktiĝis kun la verko de D-ro Zamenhof — al kiu li mem dediĉis sian tutan vivon — vi energie reagu al tiu ĉi alvoko!

Koncerne c, la Estraro tre bone komprenas, ke nur malmultaj povos doni aŭ kolekti sumon de 5000.- gld. Ja, kiel dirite, pli ol 15 eĉ ne povus esti. Sed same konvinkita estas la Estraro, ke ĉiu membro kaj ĉiu esperantista instanco ligita aŭ amika al U.E.A., volas ion kontribui por la domo, por ke ili pli forte sentu ĝin kiel sian. Tial la Estraro decidis ankaŭ, ke ĉiuj donacoj por la instalado de la domo je valoro de minimume 50.- gld, estos enskribitaj en Oran Libron pri la domo.

Ankoraŭ pli da signifo ricevos la donaco, se estos indikita la objekto, kiu estu aĉetita per tiu sumo. Ja aĉeti objektojn kaj sendi ilin al Rotterdam, tio estas komplika pro doganaĵoj kaj, krome, unu objekto estu en harmonio kun la aliaj, por ke estiĝu bela rezulto. Sed oni povas en propra lando esplori la proksimuman prezon de difinita objekto kaj sendi la koncernan sumon al U.E.A., kun informo pri la aĉetota objekto.

En la nuna momento, ĉarpentistoj, farbistoj, muntistoj kaj aliaj istoj estas ankoraŭ laborantaj por pretigi la grandan domon, kiu enhavas apartajn ĉambrojn por la biblioteko, la kongresoficejo, la libroservo, ekspedado, arĥivo ktp. Ankoraŭ ni ne scias, kiam ĉio estos preta por la translokiĝo. Sed ni scias, ke multaj objektoj estos bezonataj. Por mencii nur kelkajn: ŝtalaj skribotabloj, ŝtalaj seĝoj, kelkaj malgrandaj ŝtalaj tabloj, adicia maŝino, librotena maŝino, bretaroj por la biblioteko, kurtenoj por ŝirmi la librojn, elektraĵoj murhorloĝoj en diversaj ĉambroj, granda nilona flago ktp., sed ankaŭ malgrandaj objektoj kiel fiksiloj, truigiloj, paperujoj, leterujoj k.a. Certe ĉiu povas pripensi pliajn oficejajn bezonaĵojn kaj, se oni hezitas pri iu objekto, sufiĉos unu poŝtkarto al la C.O. por ekscii ĉu ĝi estas dezirata aŭ bezonata. Cetere, ege ŝatataj estos, kompreneble, folkloraj aĵoj el ĉiaj landoj, simple por plibeligi kaj pliagrabligi la internan aspekton de la oficeja domo.

U.E.A. firme fidus, ke absolute ĉiu membro ion aŭ iom kontribuos por SIA oficejo, por la ĉefa sidejo de sia mondorganizaĵo, kaj ĝi anticipu varme dankas al ĉiuj kontribuontoj.


E. J. Woessink,
Estrarano pri financoj

„PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO”

Pripensoj

Kie vi estas, la tempo de flaviĝinta lernolibro, barbaj adeptoj, sankta espero, la tempo de unuaj verkoj, timidaj rondoj, pasemaj gazetoj, de unuaj kvereloj kaj perfidoj, flirtantaj standardoj kaj silente por ĉiam ekdormanta Doktoro, kiu esperis pli bonan vivon, pli noblajn homojn, pli helan tagon... Ĉiam pli fora vi fariĝas kaj ĉiam pli mallaŭta. Forturnas de vi atenton la sputnikoj, lunikoj, vostokoj, kaj la bruoj de la moderna vivo elpelas neklarajn rememorojn el la animanguloj de tiuj, kiuj ĝisvivis. Ankoraŭ kvindek jaroj kaj vi fariĝos nur dato, periodo....

Sed, ĉu vi pensis, Doktoro Esperanto, tiam, en Bulonjo, kiam unuafoje vi estis montranta la Vojon, ke iam viaj vortoj povus samtempe aŭdiĝi en via amata Polujo, en Rusujo, en Italujo, Islando, Norvegujo — via voĉo de Bulonjo? Ne koleru ac, ke la nuna tempo forgesas vian tempon. Ĝi tamen ne forgesas viajn vortojn, la vortojn de via lingvo. Facila vento de loko al loko portas la vorton Esperanto. Ĉiutage miloj da koroj pli vigle ekbatas. El brueto kaj fado aŭdiĝas la voĉo de radia anoncisto: — Parolas Varsovio, naskiĝurbo de Esperanto! *La 28-an de decembro 1961 ĝi aŭdiĝis la milan fojon!* Mil... Ĉu tio estas multe? Sed, laŭ kio oni mezuru — ĉu laŭ la montriloj de horloĝo aŭ eble laŭ la batado de la esperantistaj koroj? Laŭ la folioj de tajpita teksto aŭ eble laŭ la espero kiuj plenumiĝas?



Reĝisoro, s-ro Gabriel Brzemiński, ĉe la aparataro. En la studio: f-ino Barbara Sokalówna kaj s-ro Piotr Rowiński

Ĉies jubileo

Ne estas facile skribi felietonon pri sia propra jubileo. El ĉiu frazo insidas memlaŭdo, embuskas memomaĝo, gvasas memgratulo. Kaj dum jubileo oni ja kutime vivuas. Mi tamen povas flankmeti la ĝenojn. La jubileo estas ankaŭ de niaj aŭskultantoj. De tiu, kiu skribis leteron, de tiu — kiu aĉetis novan ricevilon, por aŭdi pli bone, de tiu — kiu revenas el laborejo poŝtagmeze kaj magnetofone aŭskultas la vortojn, kiuj jam foreĝis kaj ankaŭ de tiu, kiu ne forlasis eĉ unu elsendon dum monatoj. Ilia kaj nia estas la jubileo de la mila elsendo de Pola Radio en la Internacia Lingvo. Kaj okaze de tiu ĉi jubileo mi laŭdas la komunan ideon de la esperantistoj — internacian pacon kaj amikecon.

Paco kaj amikeco

Ĉi tiu ideo arigis en aŭgusto de la 1959 jaro pli ol 3 mil homojn de diversa nacieco, religio, mondkoncepto, socia pozicio, alvenintajn Varsovion por partopreni la 44-an Universalan Kongreson de Esperanto. Ilin allogis ne nur la fakto, ke Pollando estas la patrujo de Zamenhof kaj Varsovio la naskiĝurbo de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ tio, ke ili estis veturontaj al la lando grave damaĝita dum la lasta mondmilito kaj nuntempe konstruanta socialismon, al la popolo konata pro siaj patriotismo kaj laboremo, amanta pacon kaj amika al ĉiuj nacioj. Ilian alvenon antaŭis surpriza kaj ĝojiga fakto: la 4-an de aprilo 1959 Pola Radio komencis disaŭdigi ĉiutagajn duonhorajn elsendojn en Esperanto.

Semajno ĉe ricevilo

Antaŭ la kolektivo de la redakcio aperis granda, respondeca kaj nefacila tasko. Aranĝi ĉiutagan duonhoran elsendon en tia maniero, ke ĝi estu informrica, varia, altnivela laŭ la forma vidpunkto kaj interesa por ĉiuj. Estis do fiksita semajna skemo, formujo, en kiu — depende de bezonoj kaj aktualo — alojiĝis diverstema enhavo.

Se sur tiu ĉi loko mi prezentas ĉi tiun kadron, tio ne venas de mia emo tro babili, sed deziro reliefigi la fakton de la plena taŭgeco de la Internacia Lingvo esprimi ĉiajn aferojn de la homa vivo.

Ĉiutage nia elsendo komenciĝas per novaĵoj el Pollando kaj el la mondo, venantaj de grandaj mondaj agentejoj en Okcidento kaj Oriento. Tiamaniere la esperantistoj estas informataj pri ĉio, kio grava okazas en la mondo kaj en nia lando.

Lunde proponas sin politika komentario aŭ felietono pri ekonomia, socia, kultura kaj ofte ankaŭ priesperanta temo. Aŭdiĝas ankaŭ folkloraj elsendoj — pri polaj regionoj, urboj, kutimoj. Pri famaj poeloj. Ĉiun duan lundon oni povas aŭskulti Sciencon tribunon — en ĝi pri plej diversaj branĉoj de la scienco, pri elstaraj polaj sciencistoj.

La unua *mardo* de monato enhavas ĉiam Anguleton de blindaj esperantistoj. Ĉiun mardon la ŝatantoj de muziko povas aŭdi verkojn de polaj komponistoj klasikaj, modernaj kaj supermodernaj, plenumatajn de elstaraj polaj solistoj, orkestroj kaj ensembloj. Ankaŭ marde oni povas ekscii Pri kio oni parolas en Pollando, ĉar tia estas la titolo de la rubriko, en kiu varias gravaj politikaj eventoj, sociaj kaj ekonomiaj problemoj, kulturaj okazintaĵoj, sportaj emocioj, kaj eĉ kapricoj de la vetero.

Ĉarma melodio komencas ĉiunmerkredon nian Koncerton kun bondeziroj. Esperantistaj geedziĝoj, gepatriĝoj kaj jubileo-kalejdoskopas kun simplaj vortoj de amikeco, salutoj, bondeziroj. Ĉion ĉi ornamas belaj kanzonoj kaj operarioj plenumataj ankaŭ en Esperanto fare de profesiaj artistoj aŭ kameralaj ensembloj. En Kultura notlibro vi povas aŭdi pri polaj pentristoj, skulptistoj, grafikistoj, fotoartistoj, pri polaj teatroj kaj operejoj, muzeoj kaj eldonejoj, revuoj kaj gazetoj. Ĉiam la trian merkredon de monato ni aŭdigas radian Film-Magazinon, rakontantan pri novaj polaj filmoj kaj iliaj sukcesoj eksterlande, pri niaj reĝisoroj, aktoroj kaj kameristoj.

Ĵaŭde parolon prenas Observanto, kiu en siaj



S-ino Alina Rudnicka kaj s-ro Lucjan Szolajski anoncas: "La semajno en Pollando!"



Ĉiuj ridas? Ili antaŭĝojas pri jubilea bankedo: red. Jerzy Grum, reĝisoro Gabriel Brzemiński, parolistoj: Lucjan Szolajski, Alina Rudnicka, Ksawery Jasieński, Barbara Sokalówna, red. Jerzy Uśpieński, sekretariino Jadwiga Muszyńska. Fronte: s-ino Romana Kempisty, parolistoj: Piotr Rowiński, Ewa Lutogniewska, Zbigniew Lutogniewski, red. Jerzy Mażys

komentarioj prezentas la starpunkton de Pollando pri mondaj eventoj. Trumpeto de postiljono anoncas ĉiun ĵaŭdon, ke aŭdiĝas la voĉo de nia plurmila aŭskultantaro. Esperantistoj el ĉiuj anguloj de Eŭropo, el la norda Afriko kaj foraj regionoj de Sovetunio partoprenas la diskuton en nia Leterkesto. En la leteroj ili prezentas siajn opiniojn, kritikojn, sugestojn, proponojn, rimarkojn. Ofte la vidpunktoj diferencas, ĉu temas pri politikaj aferoj, pollanda vivo, movadaj problemoj, lingvaj demandoj, ĉu temas pri nia programo kiel la tuto aŭ pri ĝiaj apartaj eroj. La rajton paroli havas ĉiuj, ĉu ili samopinias aŭ kritikas. Ĵaŭdo estas la tago de nia ronda tablo, ĵaŭde ankaŭ ni, redaktianoj, konvinkiĝas, kion pri nia laboro pensas la aŭskultantoj, kaj laŭvice ili ekscias, kiel la redakcio rilatas al iliaj ideoj. La ĉefa motivo, kiu plej forte manifestiĝas, estas la zorgo de ambaŭ flankoj, ke la elsendoj estu plej bonaj.

"Poeto mi estas sen popolo" — rajte plendis iam Kalocsay. Se eĉ li pravis en la frua epoko, nun lia diro malvalidas. La esperantaj poetoj, prozverkistoj kaj dramaturgoj per potenca voĉo parolas nun al sia popolo. *Vendredo* estas la tago de literaturo. En nia programo oni povas aŭdi la majstrajn rimojn de Kolomano Kalocsay, la lirikan kordon de Julio Baghy en lia "Songe sub pomarbo", la monumentecajn strofojn el "La infana raso" de Viljamo Auld, la pasian poezion de Marjorie Boulton aŭ la sentimentajn versojn de Baldur Ragnarsson. En ĉia formo: prozo, poezio, dramo, unu- aŭ plurvoĉe prezentiĝas ankaŭ al la esperantistaro la verkado de polaj plumhomoj. De klasikuloj kaj nuntempuloj, de katolikoj kaj marksistoj, de granduloj kaj mezuloj. *Vendrede* oni povas senti, kiel pulsadas la esperanta literatura lingvo.

Potencia muzika akordo inaŭguras sabate nian sonrevuon "La semajno en Pollando". Raportistoj migras kun mikrofono tra polaj urboj kaj vilaĝoj, rigardas al kongres-salonoj kaj fabrikoj, al teatroj kaj lernejoj, enketas gravulojn kaj simplajn civitanojn. Sabate vi havas Pollandon surmane.

Dimanĉe nian elsendon komencas "Panoramo de internaciaj eventoj". Redaktoro Leonidas Abolnik prezentas mondajn okazintaĵojn, kiel vidas ilin la pollandaj civitanoj. Tuj poste la melodio "Ĉiu, ĉiu, ĉiu" signas la finon kaj samtempe kronigon de nia programo — magazinon "Sub la verda stelo". Novaĵoj el Esperantujo, felietonoj pri movadaj problemoj, libro- kaj gazetrecenzoj, intervjuoj, raportaĵoj, kanzonoj kaj operkantoj esperante plenumataj, kaj fine la porinfanaj babiletoj de la aminda Plastuleto. Dimanĉe oni vidas kiel Esperantujo vivas kaj progresas.

Duonŝerce : kiu estas kiu ?

Ni konas niajn aŭskultantojn laŭ iliaj leteroj, ili konas nin laŭ nia laboro. Sed... kiu kion faras kaj kiu estas kiu ? — jen la demandoj ripetiĝantaj en multaj leteroj. Estus nedece rezisti kontraŭ la favora scivolo, des pli, ĉar temas pri jubileo. Kaj do !

La estro de nia redakcio estas sperta ĵurnalisto, longjara funkciulo de Pola Radio, redaktoro Michał Birbrajer. Ĝuste liaj felietonoj rakontas marde "Pri kio oni parolas en Pollando". Tre severa estro li ne estas, sed fojfoje ŝatas "prediki", precipe kiam la redakcia "maŝino" iel paneas. Entute simpatia homo. (Mi kredas, ke li legos ĉi tiun artikolon, do — ĉiuokaze...)

La redakta laboro restas en la manoj de du junaj homoj — unu jam grizhara kaj la alia kun malhelaj okulvitroj. Tiu unua estas redaktoro Jerzy Uśpieński, elstara aktivulo, ĉefestrarano de PEA,



Matenkunsidon plej bone estas komenci de komplimento : red. Jerzy Uśpieński, sekretariino, s-ino Jadwiga Muszyńska, parolisto, s-ro Zbigniew Lutogniewski, sekretario de la redakcio, red. Jerzy Grum kaj estro de la redakcio, red. Michał Birbrajer



La ĉiutagaj najtingaloj : Piotr Rowiński, Barbara Sokalówna, Zbigniew Lutogniewski

membro *honoris causa* de pluraj Esperanto-organizaĵoj. La aŭskultantoj konas lin bone, ĉar ĉiuĵaŭde li ŝiras iliajn orelojn parolante en Leterkesto. Li estas ortodoksa esperantisto. Nun vi jam scias, kial la novaĵoj de nia dimanĉa magazino rilatas al la zamenhofa epoko.

La alia estas mi. Kiel diri, por ne tro laŭdi, sed tamen reliefigi miajn grandegajn meritojn ? Do, oni riproĉas min, ke mi arogas esti la Dua Akademio de Esperanto. Oni rekte akuzas min, ke dum du jaroj mi riĉigis la lingvon multe pli, ol la Akademio faris tion dum kvindek, kvankam mi ankoraŭ ne havas barbon. Oni riproĉas min ankaŭ, ke eĉ unu fojon mi ne sukcesis malfruiĝi, spite la bonan volon de kelkaj redaktoroj, kiuj unu horon antaŭ la elsendotempo plurfoje enmanigis al mi sespaĝajn tekstojn por traduko. Mi pardonpetas. Okaze de mia nomtaga festo oni donacis al mi faldeblan liton, por ke mi ne devu forlasi la Radion.

Ne estas letero, kiun tra sia lupeo ne rigardas sinjorino Romana Kempisty. Ĉiu peto de aŭskultanto estas rapide plenumata, ĉiu afero tuj aranĝata. Ŝi estas specialistino pri geografio kaj vekita noktomeze respondas senprokraste, ke la franca urbeto Sceaux situas en la departemento Seine. De kie ŝi scias ? Nu, simple : tie loĝas nia korespondanto. Mi riverencas antaŭ ŝi kaj konsilas al vi fari la samon, ĉar alie vi povos atendi respondon post pli, ol la kutimaj kvar monatoj.

Venas vico al la aro de niaj geparolistoj. Spite la motivigitajn supozojn de niaj aŭskultantoj mi malkaŝas, ke ili ĉiuj estas profesiaj parolistoj de la pollanda programo. Tri el ili partoprenas la ĉiutagan programon : Barbara Sokalówna, Piotr Rowiński kaj Zbigniew Lutogniewski. La ceteraj aŭdiĝas en konstantaj rubrikoj aŭ en radiaj spektakloj.

Zbigniew Lutogniewski estas tamen aparta ĉapitro. Sciu, ke li ricevis premion de Pola Radio kaj Televido pro atingajoj en la profesio de parolisto.

Al mi li imponis per fulmrapida perfekta ekrego de la lingvo. Lia talento kaj laboremo ebligis al li post apenaŭ du jaroj esti radia raportisto de nia redakcio dum la Kongreso en Harrogate. *Persona grata* — ĉiuvidpunkte. Ŝatata kolego, kvankam bruema. Li estas ne nur nia parolisto, sed ankaŭ parte redaktoro kaj reĝisoro kaj tutece patro de Eva — nia Plastuleto. Tio estas lia plej granda merito.

La sola persono, kiun ni ĵaluze kaŝas antaŭ niaj aŭskultantoj, estas sekretariino, sinjorino Jadwiga Muszyńska. Ŝia beleco estas la fundamento de nia redakcio, de ŝi dependas nia financa stato, ŝia rideto sklavigas eĉ librotenistojn! Ŝi scipovas reĝisori eĉ nian lertan reĝisoron Gabriel Brzemiński. *Chapeau bas!*

Konkludoj

La mila elsendo permesas retrorigardon. La vojo trapasita pruvis, ke Esperanto en la radio estas pleje taŭga ilo. Ke la Internacia Lingvo kapablas esprimi ĉiun homan aktivecon. Aparte akcentinda estas rolo de la elsendoj kiel evoluigilo de la lingvo. La radio laŭnature postulas ja temvastecon kaj vortriĉecon. Kaj la plurnacia aŭskultantaro deziras aŭdi Esperanton flu-, klar- kaj simplastilan, unuamomente kompreneblan.

Niaj elsendoj fariĝis ankaŭ grava forumo de la Esperanto-movado, kuniga kaj informa faktoro. Ĝenerale ni estas kontentaj pro la subteno, kiun donas la esperantistoj. Kvankam ni konscias, ke ĝi povas kaj devus esti pli granda.

Ankoraŭfoje pruvigis, ke Esperanto estas bona kaj taŭga ilo de la internacia amikeco kaj kompreno. Mian jubilean paroladon mi finu per citaĵo el la artikolo pri niaj elsendoj, kiu en novembro de la pasinta jaro aperis en la ĉefa pollanda sociokultura revuo "Polityka":



S-ino Romana Kempisty ĉe la sliparo

"Ŝajnas, ke Esperanto en nia radio meritas rekonon, ke ĝi bone plenumas la rolon de ambasadoro de la poleco kaj progreso. Ŝajnas, ke Esperanto entute bone ekzameniĝas kiel rimedo de vasta interkompreniĝado de homoj de diversa nacieco, interŝanĝo de informoj kaj konceptoj, kaj per tio servas al la afero de proksimiĝo, kunlaboro, kultura ligiteco".

Jerzy GRUM

NUR TRI JAROJN ANKORAŬ ĜIS TOKIO!

En la pasinta jaro ni plurfoje publikigis informojn pri la eblecoj partopreni el Eŭropo la 50-an Universalan Kongreson de Esperanto en 1965 en Tokio. Kun granda plezuro ni povas sciigi ke ĝis nun tre kontentiga nombro da membroj provizore anoncis sin por partopreni la vojaĝon tien kaj pluraj el ili samtempe komencis ŝpari por tiu celo ĉe U.E.A.

Ni memorigas, ke de U.E.A. estas aranĝata komuna internacia karavano per aviadilo el Eŭropo al Tokio, kunlabore kun unu el la plej grandaj kaj fidindaj flugkompanioj. Estas la intenco resti en Japanujo iom pli longe ol nur la kongressemajnon, ĉar certe ĉiu deziras iom pli detale rigardi tiun mirindan landon. Ju pli frue ni povos antaŭvidi la nombron da partoprenontoj, des pli baldaŭ ni povos ellabori la detalojn. Tial estas dezirinde, ke tiuj kiuj iom serioze pensas pri partopreno, anoncu sin kiel eble plej baldaŭ. La kostoj, inkluzive de restado dum la kongressemajno, turniĝos ĉirkaŭ 2500 ned. gld. (10.000 steloj). Precizajn ciferojn pri la tiamaj prezoj ne eblas doni jam nun. Ĉar en tri jaroj multo povos okazi, oni per la provizora sinanonco ankoraŭ ne ligas sin. Poste, je oportuna momento ni petos de ĉiuj provizoraj anoncintoj la definitivan decidon pri partopreno, kun parta antaŭpago.

Por la ŝparantoj kaj ŝparantoj ĉe U.E.A. ni havas la ĝojigan informon ke, pro favora aranĝo, ekde 1962 ni povas altigi la rentumon de 2% al 3½% ! Ni do tre rekomendas al ĉiu serioza plananto pri partopreno, fariĝi Tokio-ŝparanto ĉe U.E.A. La ŝparata mono eniros apartan konton-Tokio je la nomo de la koncernato kaj jarfine ĉiu ŝparanto ricevas kontstaton. Pliajn informojn volonte donas la C.O.

Intertempe, la provizora L.K.K. en Tokio jam eklaboris por prepari grandiozan kongreson. En Harrogate Prof. D-ro Hideo Yagi invitis la esperantistaron kaj donis la unuajn informojn. Faldfolio jam estis disdonata. Estu nia devizo:

GRANDNOMBRE AL TOKIO!

*M. H. Vermaas,
Dir. Centra Oficejo*

Jacques Perk (1859-1881)

Irisa

Min naskis strio de sunradio
kaj ĝemo de maro muĝanta,
pro ŝvelo de veo al alta nubejo
sin pluvoflugile levanta.
Sur mia mantelo tremas ĉiu juvelo
kiel roso sur rozo ekflora,
dum naĝas timema en bano matena
la flamventumila Aŭrora.

Kun ploraj okuloj el altaj nebuloj
la kapon malsupren mi klinas;
mia hela hararo streĉiĝas al maro
ĝis larmoj ekĝojon esprimas :
ĉar per ama tuŝo de l'kisema buŝo
mi ondojn brilige disŝiris,
kaj el mara profundo sub buklo-abundo
Zefiro jam ride eliris.
Li ridas plenpove... sed tiel spirblove
forĉasas min, povran, fatale...
Laŭ arko kolora al regno vapora
funebre mi glitas vuale...
Li min amas kun fido, sed la voĉo, ekrido
kaj kiso nur ĝemas; ni svingas
nin ĉien sopire, vagadas rondire,
sed kison nek morton atingas.

Ne vidas min homo en nubregiono
dum mi ekploregas izola
kaj pluvsusurado en plenda kaskado
rakontas pri ve' senkonsola.
El miaj doloroj surtere la floroj
soifaj la larmojn ricevas
kaj post la torento de mia turmento
dankeme petalojn eklevas.

Ŝirflugas l'amato tra la nuba ornato
en kiu fleksante min tule,
malĝoje mi svenas, ĝis suno serenas
sur miaj trenajoj sinlule.
Eldiras nun ĉie la homoj ekkrie :
"Irisa la ora ridetas !"
ĉar mute la valan profundon brunpalan
mi lume-smeralde tapetas.

Mi metas la plandojn sur plej forajn strandojn
de l'tero, pensante senmove, —
unu bunta sopiro al arda Zefiro
ĉasonta min baldaŭ denove.
Tra mia brakparo plumsvarmas nubaro
kaj steloj en nokto malhela
kaj luno malama, dorlote sinbana
en ora ekrido ĉiela.
Mia pava dekoro nur estas favoro
de l'suno, por homa trankvilo :
ĉar min timus mortuloj pro la larmaj okuloj
kaj mia funebra profilo.
La spacon tiele brakumas mi hele
ĝis venos l'amato flirtveste,
kaj al regno malluma, sen sun' palpebruma,
mi ree forglitos sengeste. ---

Min naskis strio de sunradio
kaj maro humide ĝemanta,
pro ŝvela mondveo al alta nubejo
sin pluvoflugile levanta. —
En solo ekzila mi estas simila
al vi, kiu vivas aspire,
kaj dum eĉ ĝojeroj fariĝas suferoj
ankoraŭ ridetas altire.

El la nederlanda trad.
Albert Samyn

NOTO : Jacques Perk (1859—1881)

Nederlanda poeto. Verkis precipe sonetojn. — "Irisa", lia cignokanto, kies ritmo rememorigas tiun de "The Cloud" (La Nubo) de Shelley, simboligas la tragikan disiĝon inter *idealo* (simbolo : Irisa, la senĉese forsvenanta kaj reaperanta ĉielarko) kaj *realo* (simbolo : Zefiro, la brua, vivĝoja vento, forpelanta kontraŭvole la amatinon).

ALIĜU AL LA 47a U.K.!



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

EN 1962 NENIU LANDO SEN JUNULARA SEKCIO!

Nova jaro prezentas al ni la taskon refoje pripensi nian agadon por la disvastigo de la Internacia Lingvo en la medioj, en kiuj ni vivas. Kvankam mi nur parolas al unu grupo de la Esperantistaro, nome al la junularo, mi devas tamen konstati, ke estas tre malfacile doni ĝeneralajn konsilojn ĉie kaj ĉiam aplikeblajn.

Eĉ la fondo de novaj landaj sekcioj de TEJO kaj ties aktiva laboro renkontas multajn diversajn situaciojn, al kiuj oni nepre devas adaptiĝi, se oni volas havi sukceson. Tamen laboro de niaj landaj sekcioj laŭ nia statuto ŝajnas esti en unua loko rekomendinda.

Mi denove alvokas la Landajn Asociojn de UEA akceli la fondon de junularaj sekcioj aŭ subteni ilin

grandskale, se ili jam ekzistas. Ankoraŭ pli mi petas miajn junajn geamikojn agi en la sama senco. En tiu rilato estas necese, ke fondo de pli multaj junularaj grupoj altigu la laborkapablon de la landa junulara sekcio.

Ankaŭ la problemoj de la junularaj delegitoj ankoraŭ ne estas solvita. Ne nur en lokoj kun fortaj junularaj grupoj ni bezonas ilin, sed ĉie, kie troviĝas agema junulo aŭ junulino, kiuj plenumas la antaŭkondiĉojn por tiu grava ofico. La elekto de Estraro de TEJO pri Junularaj Delegitoj kaj Turismo montras, ke ni dediĉas specialan atenton al tiu afero.

Mi ne volas forgesi menci, ke la Komitato de TEJO dum la Kongreso

en Wokingham akceptis du novajn regularojn: tiun pri la Korespondaj Servoj de la Landaj Sekcioj kaj tiun pri la Informa Agado en la kadroj de TEJO. Tiuj novaj regularoj aldoniĝas al nia Statuto kaj al la Kongresa Regularo. Mi volas ĉi tie danki al nia iama Vicprezidanto Richard Reuchlin, al kiu ni ŝuldas la redaktadon de la Statuto kaj de du regularoj.

Por nia ekstera laboro la plej grava regularo certe estas tiu pri la informa agado. Estus tre bona signo, se baldaŭ pli multaj landaj sekcioj anoncus la fondon de Informa Fakoj. Nur se en kiel eble plej multaj landoj ni agas laŭ la samaj principoj kaj per taŭgaj metodoj, ni povos en la jaro 1962 pli grandigi nian influon.

Bedaŭrinde en la nuna momento mi ankoraŭ ne povas inviti al difinita loko por la 18-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Pro la fakto, ke en Danlando oni ne povos organizi ĝin, mi devis peti en la lasta momento niajn junajn svedajn geamikojn transpreni la organizadon kaj mi esperas revidi multajn el vi en Svedujo.

Günther Becker

Prezidanto de TEJO

Belarta Konkurso 1961

Sekcio : Originala Poezio

Dua premio

Junia Pluvo

Junia pluvo
dum time vi ridetas
kaj ĉe la sojlo
gutbrile atendente
en flora jup' koketas.

Junia pluvo
dum trile vi eksaltas
sub amkareso
en nuko gutmalseka
kaj kisoflu' ne haltas.

Junia pluvo
dum lipoj lipojn premas
en hejmlankvilo.
Revenis vi, ho kara,
kaj tempo reserenas.

Aŭdu! vin bojsalutas
la hund' — kaj oron
dolĉfluta fring' elŝutas.

Albert Samyn



Foto-Konkurso "La Homaro" — Honora Mencio
William Auld: "Estonteco"

Geografia Semajno en Odense, Danujo

Dum la antaŭkongresa semajno (28/7 - 4/8 1962) okazos la Kvara Internacia Geografia Semajno en tipe dana popol-altlernejo: **Husmandsskolen** apud la urbo Odense, ĝuste en la centro de Danujo. La gelernejestro **Grønberg** bone scias Esperanton, kaj ilia tute moderna lernejo kun grandega parko prezentas tre taŭgajn eblecojn por studado, ripozo kaj gaja somerumado. Aparte oni povos studi danan agrikulturon kaj kooperadon, ĉar la lernejo posedas modelan bieneton.

Prelegoj okazos i.a. pri Balkana folkloro, Sociologiaj fenomenoj en Bulgario, Afriko sub naciaj koloroj, Dano rigardas Ĉinion, Esperanto en geografia instruado, Fungo-narkotikoj. Filmoj kaj multaj kolorbildoj kompletigos la temojn. Vespere aperos "Parolata Geografia Revuo" pere de la partoprenantoj, de kiuj oni cetere akceptas aliajn popularajn preleg-proponojn, tiel ke la programo certe povos kontentigi ankaŭ nefakulojn.

Ekskursoj estos tra la dolĉa, fuenta pejzaĝo al antikvaj memoroj (vikinga ŝipo en tomb-altaĵo), mezepokaj kasteloj, grandega ŝipfarejo k.a. — En Odense oni rigardos la naskiĝdomon kaj la muzeon de la plej fama dano: Hans Christian Andersen.

La prezo estos 175 d.kr. por plena gastigo en dultaj ĉambroj, ekskluzive ekskursoj. Ne-membroj de Internacia Geografia Asocio krompagu 5 d.kr.

Plurajn informojn kun aliĝilo petu — se eble aldonante respondkuponon — ĉe la organizantoj: **Roma kaj Poul Thorsen**, instruistoj pri geografio, Dyblandsvangen 7, Kopenhago, Brh.

Ŝaka Rubriko

(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Nia dua problema konkurso.

Post ĝojiga sukceso de nia problema konkurso 1961 ni malfermas novan konkurson, kiun povas partopreni ĉiuj esp.ŝakistoj. En preskaŭ ĉiu numero de nia revuo aperos po unu problemoj kun mencio, kiom da poentoj vi ricevos pro ĝusta solvo. Ni lotumos kelkajn premiojn al tiuj, kiuj atingos plej multe da poentoj. Ĝis fino de novembro (do ankoraŭ antaŭ finigo) partoprenis la konkurson 1961 preskaŭ 70 gesamideanoj el 26 landoj. La rezultato de unua konkurso aperos en nia maja aŭ juna numero.

Ni esperas, ke la konkurso 1962 havos ankoraŭ pli multajn partoprenantojn kaj ke eĉ la nombro de landoj kreskos. Ĝis nun ja venis neniu solvo el Britujo, Jugoslavio, Norvegujo kaj Svislando — kvankam en tiuj landoj (precipe en tiuj du unue nomitaj) estas multaj esp. ŝakistoj.

Ŝaka kunveno en Kopenhago. En kadro de 47a UK en Kopenhago okazos ree ŝaka kunveno. Ni atentigas jam nun ĉiujn amikojn de esp. ŝako, ke ili ne forgesu partopreni. Pri preciza tago kaj horo atentu la Oficialan bultenon de 47a UK. Se eblos, ni okazigos ankaŭ rapidturniron.

Ŝaka terminaro, verkita jam antaŭ pli longa tempo de nia svislanda samideano O. E. Zimmermann, estas preta por presigo. Se ne eblos eldoni ĝin memstare, ni aperigos ĝin kiel aldono al EŝLI-bulteno, la ESPERANTA ŜAKO. Ĉu vi jam legis la unuajn numerojn de tiu ĉi bulteno? Se ne, skribu al s-ro Jean Duthilleul, 7 rue Commandant Carlihan, Briançon, (Hautes Alpes), Francujo.

Sicilia ludo

Blanko: Goldin Nigro: Ambarian
(ludita en ĉampioneco de Armenio en 1960)


1. e2 — e4, c7 — c5, 2. Ĉg1 — f3, d7 — d6, 3. d2 — d4, c5 × d4, 4. Ĉf3 × d4. Ĉg8 — f6, 5. Ĉb1 — c3, a7 — a6, 6. Kc1 — g5, Ĉb8 — d7, 7. Kf1 — c4, Dd8 — c7, 8. Kc4 —

b3 b7 — b5? (pli bona estis g6 kun sekvantaj Kg7 kaj 0—0 por finigi evoluon), 9. 0 — 0, Kc8—b7, 10. Tfl — e1, Ĉd7 — b6 (defendas ankoraŭ unufoje la kampeton d5, ĉar timas la movon Ĉc3—d5. Sed venas katastrofo!) 11. Kg5 × f6!, e7 × f6 (post gxf6 sekvus 12. Dh5, Ĉc4, 13. Ĉxb5!, axb5, 14. Dxb5! kun preno de Ĉc4), 12. a2 — a4!, b5 — b4, 13. a4 — a5!, b4 × c3 (eble pli bona estis Ĉd7, sed post 14. Ĉd5 la pozicio de nigro estas malesperiga), 14. a5 × b6, Dc7 — c5 (Je Dxb6 15. Ka4!, Rd8, 16. bxc3 kaj nigro timis la movon Tabl), 15. Kb3 — a4!, Re8 — d8, 16. Dd1 — g4!, Dc5 — c8 (ne Kc8 pro 17. b7! kun tuja gajno) 17. Dg4 — h5, g7 — g6 18. Dh5 — d5!! (belega ofero de Damo, kiun Nigro ne povas rifuzi per la movo Re7 pro 19. Ĉf5!, gxf5, 20. exf5! ktp) K b7 × d5, 19. e4 × d5 kaj Nigro rezignis (Post Ke7 sekvus 20. Ĉc6!, Re8, 21. Ĉx7!, Rf8, 22. Ĉxc8 kaj al Blanko restos je unu figuro pli.

Problemo n-ro 17 (konkurso 1962 — n-ro 1)

J. Savournin (Ia premio The Problemist 1960)

Mato en 2 movoj (pro ĝusta solvo 2 poentoj)



Kontrolo: Bl.: Rg8, Df5, Tf7, Tg7, Kd8, Ĉb7 (6)

Ni.: Re8, Da3, Th6, Kb3, Kh2, Ĉc5

Ĉf4, p.: a4, h7 (9)

Solvojn sendu al gvidanto de Ŝaka rubriko, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio ĝis 31.3.1962.



La 29-an de oktobro 1961 la Esperanto-Unuiĝo Grand-Kolonjo (Germanujo) solene inaŭguris la novan Zamenhofstraton en ĉeesto de pli ol 60 personoj. La stratŝildo havas jenan surskribon:

Zamenhofstr.

Aŭtoro de Esperanto

Al ĉiuj enloĝantoj de ĉi tiu strato la kolonjaj gesamideanoj transdonis leteron kun detalaj sciigoj pri Esperanto kaj D-ro L. L. Zamenhof. La ĉefurbestro de Kolonjo, s-ro Theo Burauen, kiu multe subtenis la klopodojn de la esperantistoj, meritas specialan dankon.

ESPERANTO KAJ STENOGRAFIO

Jam en "Esperanto" n-ro 627 / febr. 1958 ni povis informi niajn legantojn, ke artikolo pri nia lingvo aperis en 1955 en tiama 3-a eldono de la lernolibro "Stenografia II." por ekonomiaj

lernejoj en Slovakio. La sama artikolo aperis ankaŭ en la postaj 4-a, 5-a kaj nuna 6-a eldono de la sama libro. Tiel ĉiuj 16-17 jaraĵ studentoj en slovakaj ekonomiaj lernejoj informiĝas pri nia lingvo jam dum pluraj jaroj. Aŭtoro de la lernolibro, s-ro Jozef

Mistriĥ, atingis nun altan diplomon "Kandidato de Sciencoj" kaj laboras en la Slovaka Scienca Akademio, en la lingvista fako.

UEA-Delegito en Bucuresti, Rumanujo, s-ro d-ro Aurel Boia, kun s-ro Henri H. Stahl, eldonis popularan lernolibron de rumana stenografio (sistemo Duployé) sub titolo "Să scriem repede".

Ankaŭ tiuj aŭtoroj enpresis artikolon pri Esperanto en la libro, kiu estas eldonita en 10.000 ekzempleroj. La vorto "Esperanto" falas en okulon de leganto sur pĝ. 38 kiel unua vorto de la artikolo.

Kune kun ruslingva "Fonostenografia" de Olga S. Aleksandrova, kiu eldonis sian lernolibron en Kiŝinev en Moldavia SSR en 1958 kaj enpresis en ĝi adaptan de sia sistemo por Esperanto, ni havas jam en orienteŭropaj landoj 3 stenografiajn lernolibrojn nacilingvaj, kiuj atentigas la adeptojn de stenografio pri nia lingvo.

Adolf Staňura, Ostrava, ĈSSR

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

		Malongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.
Ciutage	15.30-16.00	Warszawa, 249m. (1205 kcs), 48.43m., 42.11m., 41.99m., 41.12m., 31.50m., 31.45m., 31.01m. P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	10.50-11.00	Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79m. K. Radio Poti, Av. Deodoro 245. Natal, Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 41.18m., 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 41.35m., 30.93m. P.
	23.40-24.00	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	23.45-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 92.30m, 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
	12.20-12.30	Bern, 48.66m, 31.46m, P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.00-18.15	Valencia, 193m. (1379 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	16.40-16.50	Wien, 513m. (594 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30 a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	12.20-12.30	Bern. Kiel lunde (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 470m. (640 kcs), 48.54m., 30.98 m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	06.00-06.15	Gdansk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk-Wrzeszcz, Pollando.
	08.35-08.45	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orleans (Loiret), Francujo.
	21.15-21.25	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	22.05-22.20	Bern, 48.66m., 31.46m., 21.25m. P. (D-ro Baur).
Vendredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.00-22.10	Hilversum 402 m. (746 kcs). V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m, 30.71m, 25.10m, 16.78m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde. (D-ro Privat).
	22.00-22.30	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K.I. Radio Roquete Pinto. Av. Erasmo Braga 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.

Radio Roma. 2-I, Tra la literaturo; 5-I, Epifanio; 9-I, Novaĵoj el Italujo; 12-I, Leterkesto kaj bibliografio; 16-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 19-I, Tra Romo : Koloseo kaj Domus Aurea; 25-I, Itala belarta urbo Cosenza; 26-I, Italujo kaj fremda komponisto R. Wagner; 30-I, Itala turismo urbo Lecco. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. La fakestro pri Esperanto de Radio Roma estos danko al la aŭskultantoj se de tempo al tempo ili informos lin pri ilia kaptado de la dissendoj kaj pri la Esperanto-movado en ilia urbo.

Pola Radio en Varsovio daŭre elsendas ĉiutage laŭ la jena programo : lunde, politika, socia, ekonomia, kultura, scienca aŭ priesperanta temo; marde, prezentado de polaj muziko kaj muzikistoj kaj krome, la unuan mardon de ĉiu monato, anguleto por blinduloj; merkrede, kultura kroniko kaj koncerto kun bondeziroj; ĵaŭde, komentario pri aktualaj temoj kaj leterkesto; vendrede, literatura rubriko; sabate, sonrevuo pri la semajno en Pollando; dimanĉe, panoramo de internaciaj eventoj, esperantista magazino, esperantaj kanzonoj, rubriketo por infanoj; krome, ĉiutage, novaĵoj el Pollando kaj el la mondo.



47-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4-11 aŭgusto 1962

Sub la Alta Protektado de la Dana Ĉefministro Viggo Kampmann.

Konstanta Adreso : ĉe Universala Esperanto-Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

No. 3 Rotterdam, la 1-an de dec. 1961

Novaj Kotizoj :

Ek de la 1-a de januaro 1962 validas jenaj novaj kotizoj :

- Kongresano
ned. gld. 46,00 (d.kr. 88,00)
- Edz(in)o de kongresano
ned. gld. 23,00 (d.kr. 44,00)
- Junul(in)o ne pli ol 20 jara
ned. gld. 17,25 (d.kr. 33,00)
- Studentoj de 20 ĝis 30 j.
ned. gld. 28,75 (d.kr. 55,00)
- Blindulo kaj ties gvidanto
ned. gld. 23,00 (d.kr. 44,00)

Komuna Loĝejo :

La Loka Kongresa Komitato aranĝis komunan loĝejon en taŭge ekipita konstruaĵo, kies celo estas gastigi karavanojn, kiuj vizitas Kopenhagon. Troviĝas sufiĉe da lavejoj (kaj duŝo) kaj sufiĉe da loko por valizoj kaj vestaĵoj. La ĉambroj estas bone aerumitaj kaj puraj. La prezo estas 37,00

ned. gld. por unu semajno, inkluzive matenmanĝon. Pliaj informoj kaj la koncerna mendilo aperos en la Dua Oficiala Bulteno.

Prezoj en Restoracioj :

Troviĝas multaj restoracioj en la ĉirkaŭaĵo de la Kongresejo, ankaŭ restoracioj por memservado, kie la prezoj estas tre malaltaj. Ekzemple supo kostas d.kr. 1,15 kaj la plej multekosta manĝo d.kr. 5,10.

Ekskursoj :

La Loka Kongresa Komitato decidis ke la tuta tago jaŭdo, la 9-a de aŭgusto, estu dediĉita al kvar samtempaj tuttagaj ekskursoj, kiuj celas al :

NORDA SELANDO (Sorgenfri-Frederiksborg-Fredensborg-Kronborg)

MEZA SELANDO (Roskilde-Ringsted-Sorø-Slagelse-Trelleborg)

ATOMESPLORA CENTRO "Risø-Roskilde-Ledreborg)

ODENSE, la urbo de H. C. Andersen (Kopenhago-Korsør-Nyborg-Odense)

LKK decidis ankaŭ pri ĉiutaga ekskurso tra "Ĉarma Kopenhago". Pliaj detaloj, prezoj kaj mendiloj troviĝos en la Dua Oficiala Bulteno.

Dua Bulteno :

Ek de februaro 1962 ĉiu aliĝinta kongresano ricevos la Duan Oficialan Bultenon. La broŝuro, ilustrita, enhavas la provizoran programon de la Kongreso, informojn pri ĉiuj aranĝoj ligitaj kun la Kongreso kaj kompletajn instrukciojn pli loĝado kaj ekskursoj.

Antaŭ- kaj postkongresaj aranĝoj :

Antaŭ la Kongreso okazos en Frederikshavn la 18-a Internacia Junulara Kongreso kaj en Helsingør FERIA Semajno. Post la Kongreso en Frostavallen okazos Prelegsemajno kaj al Faaborg celas la Postkongresa Ekskurso.

Statistiko ĝis fino de novembro :

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 4, Brazilo 4, Britujo 23, Bulgariujo 4, Danlando 54, Finnlando 4, Francujo 19, Germanujo 19, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Italujo 9, Japanujo 3, Jugoslavio 6, Katario 1, Libano 1, Nederlando 10, Norvegujo 2, Nov-Zelando 1, Pollando 7, Portugalujo 1, Svedujo 14, Svisujo 2, Usono 1. Entute 198 el 27 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

ESPERANTISTA VIVO

Jaroslav Šustr en Praha iĝis 6-an de decembro 1961 sesdekjara. Jen samideano, kiu dum ĉiuj cirkonstancoj, ekde la germana okupacio ĝis hodiaŭ, tenis alte la standardon de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado. Bonvolo al ĉiu, oferemo kaj diligento estas tiuj ecoj, per kiuj li akiris amikojn en sia ĉirkaŭaĵo kaj ĉie tra la mondo. Gratulon kaj sinceran bondeziron de longaj jaroj pliaj en viglo kaj sano !

Tra la Mondo

Britujo

● **Thomas Bennett School**, (Grandega mezgrada lernejo. 2.000 gel.) Crawley, Sussex, Anglujo : bezonos por septembro 1962 spertajn diplomitajn lingvoinstruistojn por instrui pri franca/hispana kaj Esperanto, hispana/franca kaj Esp. aŭ franca kaj Esp. Ankaŭ instruataj estas germana, itala kaj rusa. Esperanto estas devige instruata dum lernejoj horoj al unu fluo en ĉiu jara grupo. Informu vin tuj ĉe S-ro Raif Markarian, Estro de la lingvofako, ĉe la lernejo. Apartamentoj aŭ domoj estos lueblaj en la urbo por la elektitaj instruistoj.

Francujo

● **Verkoj de D-ro Zamenhof** estos denove haveblaj ! La 25an de septembro 1961 s-ro André Ribot (Editions Françaises d'Esperanto, 11 rue Paul-Vergnes, Marmande (Lot-et-Garonne, Francujo) subskribis kun s-ro Ludwig Zamenhof, nepo kaj laŭleĝa heredinto de D-ro L. L. Zamenhof, kontrakton, laŭ kiu li estas de tiam posedanto de la aŭtorrajtoj kaj de la eldonmonopolo de la sekvantaj verkoj de nia Majstro : Fundamento de Esperanto ; Lingvaj respondoj ; Fabeloj de Andersen ; Hamleto ; La batalo de l' vivo ; Marta ; Proverbaro esperanta. Pro aranĝoj faritaj jam antaŭ la subskribo de tiu kontrakto, s-ro Régulo Pérez aperigos la Proverbaron.

● **La Nord-Franca E-federacio** preparas "esperantistan tagon". Tiu-ĉi manifestacio okazos en la kadro de la internacia komerca foiro de Lille (22an de aprilo — 8an de majo).

● **Pluraj televidaj elsendoj** prezentis la faman mensan kalkuliston Maurice Dagbert, kiu sukcesis solvi dek malfacilajn problemojn unu minuton tri-dek-kvin sekundojn pli rapide ol elektra kalkul-maŝino. Kiel li tion lastatempe konfirmis al U.E.A.-delegito, S-ro Dagbert estas amiko de la Internacia Lingvo. Li deziras, ke oni instruu esperanton ĉe la lernejoj.

● **Radio-Lille** anoncis unuafoje la 30-an de oktobro la kongresojn, kiuj regule okazas en Norda Francujo. Krome, la radio-stacio prezentis intervjuon de regiona respondeculo de la Esperanto-movado.

Germanujo

● **Filatelio laŭ-tema.** Seriozaj filatelistoj, kiuj kolektas laŭ klasikaj vidpunktoj, plej ofte apartenas al la FIP (federacio internacia pri filatelo). Dum la lastaj jaroj tre multaj filatelistoj decidis, kolekti ne plu laŭ la klasika metodo, sed pri-labori certajn temojn. Tiamaniere de jaro al jaro kreskas la nombro de la kolektoj laŭ motivoj. La koncerna organizaĵo estas la FIPCO (federacio internacia pri filatelo laŭ-tema). La nura kompilo de poŝtmarkoj,

kiuj montras similajn bildojn, ne estas filatelo laŭ-tema. Necesas elekti certan sistemon por ordigi la markojn kaj stampojn, priskribi la detalojn de la bildoj kaj esplori pri specialaĵoj. Per la prilaboro laŭ-tema oni altniveligas la poŝtmarkan kolektaĵon. En la kadro de la FIPCO formiĝis laborgrupoj por multaj temoj. De "Aeronaŭtiko" ĝis "Zoologio" la intereso trovas temojn prilaborindajn. Ĝis nun mankis la temo "Esperanto", sed jam FIPCO intencas fondi laborgrupon pri nia lingvo. Estas bonŝanco por la seriozaj filatelistoj inter la Esperantistaro. Ili havas okazon kaj pliriĉigi la kolektaĵon kaj propagandi Esperanton en la rondoj de la motivkolektantoj. Laborgrupo filatela funkcias per la kunhelpo de ĉiuj interesuloj. Kiu estas filatelisto kaj jam prilaboras aŭ intencas prilabori la temon "Esperanto", estas petata skribi mallongan informon al Sinjoro Hermann Heiss, Hoellmattstrasse 43, Oberkirch (Baden), Germanio. Tuj post la definitiva fondo de la laborgrupo la skribintoj ricevos detalan respondon.

Israelo

● **65-jarulo iĝis Dumviva Membro de UEA.** Septembra numero de "Esperanto" informis, ke israela esperantisto s-o Ota Ginz iĝis DM de UEA. Per pago de tiu alta kotizo honoris lin lia malnova aŭstralia amiko okaze de lia 65-a naskiĝtago. Tiamaniere li per aĉo akcentis sincerecon de sia deziro, ke s-o Ota Ginz vivu multajn jarojn pliajn. Sekvas du instruoj : 1. Jen bonega naskiĝdonaco al viaj amikoj kaj 2. Ne nur junuloj aliĝu kiel dumvivaj membroj al UEA !

Jugoslavio

● **Ĉu Mediteraneo kantas gramofondiske ?** Post altnivelaj kantkoncertoj en 5 diversaj landoj, kaj precipe post prezento de tre bonkvalita koncerto "Mediteraneo kantas" en Harrogate dum la U.K., la Esperantista Junulara kankoro el Ljubljana ricevis el pluraj flankoj instigojn klopodi, ke iu firmo eternigu kelkajn plej elstarajn kantojn sur gramofondisko. Oni ekstraktis pri la afero kun entrepreno "JUGOTON", Zagreb, Ilica 213, Jugoslavio, kiu esprimis pretecon fari du diskojn kun E-kantoj, se esperantistoj en la tuta mondo montros sufiĉan aĉetintereson. Oni planas registri po 4 kantojn sur ĉiu disko, kaj inter tiuj kantoj estos ankaŭ "Ho mia kor'" de Zamenhof (muziko de Vili Šćuka). Nun, karaj samideanoj en la tuta mondo, dependas de vi, ĉu la ekzistanta kolekto de E-diskoj estos pliriĉigita per du novaj gramofondiskoj. E-kluboj kaj unuopuloj petu senprokraste tuj al la supradonita adreso ellaboron de tiaj diskoj. E-gazetoj petataj represi !

● **E-ekspozicion aranĝis en Beograd** inter 8-18. de oktobro la Beograda Esperanto-Komitato honore al la 20-jara datreveno de Popola Revolucio,

sub titolo "Esperanto en la servo de homa interkompreniĝo". La ekspozicion vizitis pli ol 10.000 homoj kaj multaj enskribis tre favorajn impresojn en la libro de vizitantoj.

● **Historio de E-movado en Jugoslavio** el la plumo de konata jugoslavia esperantisto Marinko Ĝivoje, komencos aperi en daŭrigoj en monata regule aperanta ilustrita revuo "Jugoslavia Fervojisto" ek de januaro 1962. Ĝi estas frukto de 15-jara diligenta kolektado kaj esplorado fare de la aŭtoro kaj kvindekda liaj helpantoj. Interesatoj povas aboni "Jugoslavian Fervojiston" (Zagreb, Mihanovićeve 12) kontraŭ konsiderinde malalta abonkotizo de 480.-din. por Jugoslavio kaj 1 dol. aŭ egalvaloro por eksterlandanoj (abonebla pere de UEA).

● **En du fervojistaj metilernejoj en Zagreb** Esperanto estas instruata dufoje semajne al 127 lernantoj (instruas s-anino Božena Vanjek).

Nederlando

● **La esperantistoj en Zeist**, instigitaj de artikolo de D-ro Albault en "Kulturaj Kajeroj", organo de la Kulturdomo Grésillon, sukcesis aranĝi ekspozicion en la urba biblioteko. La oficialan malfermon ĉeestis la Urbestro kaj la ina skabeno por instruado. Prelegis dum kvaronhoru kaj tre favore al Esperanto Mgr. K. van Rijckevorsel, membro de la parlamento. Dum dua speciale disponigita libera vespero, la sekretario de la grupo, s-ro Van Wijnen, donis publikan lecionon.

● **Libro-venda firmao N.V. de Arbeiderspers**, kiu havas butikojn en 13 nederlandaj urboj, nun havas stokon de 137 diversaj esperantaj titoloj, abo-

nigas esperantajn gazetojn, kaj vendas diversajn aliajn esperantaĵojn. La firmao eldonis detalan katalogon de la stoko. Ni rekomendas subtenon de la koncerna firmao per aĉetado de niaj libroj.

Pollando

● **Semajna gazeto "Życie Bytomskie"** (La vivo de Bytom), eldonata en 20.000 ekzempleroj, havas konstantan rubrikon en Esperanto, gvidata de la ĉefredaktoro de la gazeto, Marian Niewiarowski.

Sovetunio

● **Nova lernolibro de Esperanto en Soveta Unio, disvendita en kelkaj tagoj.** Estas konate, ke en 1957 aperis en Leningrad malgranda lernolibro de Esperanto, verkita de N. D. Andrejev, kandidato de filozofiaj sciencoj. Tiu libreto, la unua post multaj jaroj en la rusa lingvo, estis eldonita en 90.000 ekzempleroj kaj disvendiĝis rapide en nur kelkaj tagoj. En septembro de 1961 la Instituto de Internaciaj Rilatoj en Moskvo eldonis novan lernolibron sub la titolo Osnovy Esperanto (Fundamentoj de Esperanto) de I. V. Sergejev. La lernolibro enhavas ankaŭ malgrandan vortaron. La eldonkvanto ne estas indikita, sed verŝajne ĝi estis publikigita en pluraj miloj da ekzempleroj. Ankaŭ ĝi tuj disvendiĝis. El letero de rusa esperantisto ni ĉerpas jenajn informojn: "Ja neniu dubis, ke la libro estos tuj elĉerpita, ĉar la antaŭmendo estis grandega... En tri magazenoj de Moskvo la libro estis elĉerpita laŭ antaŭmendoj dum unu sola tago. Alia librovendejo de fremdlingvaj libroj ricevis, anstataŭ la menditaj 22 mil ekzempleroj, nur 900 kaj

povis liveri la libron eĉ ne al ĉiuj antaŭmendintoj.... En vitrino ĝi nenie estis videbla. Nur se vi venis en la magazeno kaj demandis pri la libro, oni respondis, ke ĝi estas vendata laŭ antaŭmendoj. Mi ne scias kiel vendiĝis la libro en diversaj aliaj regionoj, sed mi scias precize ke por tuta Dnepropetrovsk oni ricevis nur 100 ekzemplerojn kaj por tuta Jalta 200 ekzemplerojn de la libro, kiuj tuj disvendiĝis. De ĉie venas petoj pri reeldono de la lernolibro". Tiu eksterordinare grandega interesiĝo por lernado de la Internacia Lingvo en Soveta Unio espereble estos kontentigita.

Usono

● **Scienca Esperanto-Fako** de Iberia Translations, (Fernando Martínez, Prezidanto), 130 West 57th St. (Suite 6-B), New York 19, N.Y., Usono, pretigas publikadon de revuo pri lingvistiko en pluraj lingvoj, por diskonigi la gravan rolon de lingvoj en la scienco kaj la teĥnologio. Ili pensas uzi la revuon por disvastigi Esperanton tra la sciencaj medioj de Usono. Ĉiu kiu povas helpi estas petata sendi al ili ĉiajn uzeblajn informojn (pri la movado kaj uzado de Esperanto) por ke ili povu verki artikolojn kun freŝaj informoj el la tuta mondo. Ankaŭ mallongaj artikoloj estos bonvenaj.

● **"Esperanto Review"**, la organo de ELNA, Vol. 9 n-ro 5, estas speciala 40-paĝa numero en angla lingvo, kun bonegaj informaj artikoloj pri Esperanto. Tre rekomendinda por propagando en anglalingvaj landoj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de decembro 1961

instruisto, 20, Queens Road.

N-ro 344

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de novembro 1960.

	1960	1961
Asociaj membroj	20789	18545
Individuaj membroj		
MJ	843	834
MA	5035	5252
MS	566	480
Pat.	5	2
DM	367	416
HM	43	43
J-MJ	30	32
J-MA	190	170
	7079	7229
	27868	25774

DELEGITOJ

Belujo

Oostende D : S-ro C. R. A. Declerck, lingvo-instruisto, Nijverheidstr. 51.

FD (Instruado) : la D.

FD (Naturismo) : la D.

Britujo

Sandown (Isle of Wight) D : E. R. Holt,

Finnlando

Karkkila D : vakas.

Kuusankoski (Kymen lääni) D : S-ro U. Seppälä, fabriklaboristo, Kirkkotie 12 B 10, Voikka.

Oulu D : vakas.

Francujo

Chatel-Guyon (Puy de Dôme) D : vakas.

Sologny (Saône et Loire) D : S-ro F. V. Mathias, terkulturisto, Sologny.

Germanujo

Augsburg (Bayern) D : S-ro H. Schmid, melkistomajstro, Augsburgerstr. 19, Augsb.-Täfertingen (13b).

Neustadt (Weinstr.) FD : (Fervojo) : vakas.

Hispanujo

Guareña (Extremadura Badajoz) D : vakas.

Italujo

Cervia (Ravenna) D : S-ro G. Melandri, hotelestro, Viale dei Mille 70.

Ravenna FD (Filatelo) : vakas.

Sovetunio

Djambul (Kazaŝkaja SSR) D : vakas.

Usono

Newton Centre (Massachusetts)

D : vakas.

FD (Religio) : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Futran, J., New York, Usono.

Heilberg, L., San Francisco, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

474. Real, S-ro P., Paranaŭai, Brazilo; 475. Pinheiro-Guimarães, S-ro R., Helsinko, Finnlando; 476. de Vries, S-ro J., Leeuwarden, Nederlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

20. Lamberts, S-ro V., Bruxelles, Belgujo; 21. Teukku, S-ro T., Vammala, 22. Vilki, S-ro J., Somero, Finnlando; 23. Gründler, S-ro M., Bad Homburg v. d. Höhe, 24. Joilliet, S-ro L., Wiesbaden, 25. Wagner, S-ro H., Fürth, Germanujo; 26. Henderson, S-ro D. C., Etobicoke, Kanado; 27. Bourgeois, S-ro M., Tananarive, 28. Rousseau, S-ro H., Tananarive, Madagaskaro; 29. Baaten, S-ro W., Utrecht, 30. van Dijk, S-ro

J. P., Oosterland, 31. Douma, F-ino J. S., Deventer, 32. Kroon-Rentinck, S-ino J., Eemnes, 33. Laverman, F-ino A. A., Leeuwarden, 34. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, 35. Pannenburg, S-ro R., Nieuwe Pekela, 36. Roelofs, D-ro W. P., Soest, 37. de Vries, S-ro J., Leeuwarden, Nederlando; 38. Bengtsson, S-ro K., Krylbo, 39. Blid, S-ro A., Nynäshamn, 40. Dahl, S-ro E., Uddevalla, 41. Emson, S-ino R., Borås, 42. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, 43. Julin, S-ro T. Stockholm; 44. Karlsson, S-ro H., Kisa, 45. Lindberg, S-ro E., Borås, 46. Moberg, S-ro K. J., Bromma, 47. Möllestad, S-ro S., Kramfors, Svedujo.

DONACIOJ AL A.P.O.

S-ro R. H. Bossong, Nederlando, 5 gld., S-ro Cunier, Francujo, 3,70 gld.

DONACIOJ AL INTERNACIA ARTA TEATRO

A. E. Bosschaart-Ploeger, Nederlando, 10.- gld., D-ro W. P. Roelofs, Nederlando, 5.- gld.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18.682,08 gld.

D-ro A. Vieira Araujo, Portugalujo, 28,02 gld.

Entute 18.710,10 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro !

FONDAJO DOMO

S-ro T. Jung, Nederlando, 150.- gld.

DONACIOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro W. Singer, Nederlando, 5.- gld., Sveda Esp. Fed., Svedujo, 11,81 gld., S-ro A. Holzhaus, Usono, 6,94 gld.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 246 MA, 31 MJ, 6 J-MJ kaj 1 J-MA. S-ro H. Tonkin, Britujo, 1 MJ; S-ro A. Ohme, Germanujo, 1 MA, S-ro A. F., Italujo, 1 J-MJ.

Entute : 247 MA, 32 MJ, 7 J-MJ, 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

Al ĉiuj donancintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

AVERTO ! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Prelegu per diapozitivoj : informos Lentaigne, 3, Gaillarde, Montpellier, Francujo.

I.F.S. en Romans. La grupo "Bona Stelo" 31, rue Pêcherie Romans, Drôme, Francujo, organizos de la 20-a ĝis la 27-a de Julio 1962 Internacian Ferio-Semajnon laŭ plej favoraj prezondiĉoj, en tutamikeca atmosfero. Ĝi entenos multajn ekskursojn tra la mirinde bela regiono. Petu rapide informojn ĉar ni ne povos superi limigitan kvanton da aliĝoj.

Esperanto-Civito, unusola Esperantujo. Se vi pretas servi al homaro kaj samtempe realigi Zamenhofan revon, mendu novan ampleksan prospekton, kun adresaro por reciproka interkonsiliĝo, kontraŭ 2 respondkuponoj. Ĝisnunaj donacintoj, sinproponintoj kaj pluraj eminentuloj ricevas senpete. Ne utilas por unu-vesperon-semajne inklinaj personoj. D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Esperanto-klubo Jihlava eldonis memor-glumarkojn. 1 serio = 1 rpk. Mendu ĉe Frank Tichý, poŝtkesto 120, Jihlava, Ĉeĥoslovakio.

Belan frontispicon havas "William Penn" majstra prelego de Prof. E. Privat pri paca pioniro. 4 rpk. aŭ steloj. Kvakeraj Esperantista Societo, 5 Cotham Park North, Bristol 6, Anglujo.

Se ekzistas Rotariano kiu havas fil(in)on dekelkjaran, kiu parolas Esperanton kaj ne bone la anglan, bonvolu

skribi al "Esperanto", 11 Shaftoe Cres, Hexham, Northd, Anglujo.

Diederik van Daalen, Fazantlaan, Bergeyk (Nederlando), lernanto de la dua gimnazia klaso, deziras korespondi kun 14-jara knabo.

Kolektamikoj de "Sportvereinigung Waagner-Biro AG Zentrale, Sektion Briefmarken, Wien V, Margaretenstrasse 70" serĉas interŝanĝadon kun ĉiulandaj kolektantoj. Sendu 300 variajn PM kaj neuzitan novaĵserion. Egalvalora interŝanĝendaĵo garantiata. Mankolistinterŝanĝadon laŭ Michel, novaĵinterŝanĝadon, UTK laŭ nominalo. Enskribitaj unuasendaĵoj dezirite. Ĉiam valide !

Kvindekjara esperantisto, emante disvastigi Esperanton, petas ĉiujn institutojn, universitatojn k.t.p. Esperantagantojn : bonvolu sendi kuraĝigan Esperantan korespondadon, forpuŝante apation el niaj institutoj-universitatoj jam duonaltiritaj al nia celo. Adresoj : Universidad Tucumán, Argentino - Concejo Difusion Cultural - Facultad Filosofia-Letras - Departamento extensión Universitaria - Dirección Turismo - Gobernación Tucumán - Gaceta - Noticias.

S-ro Enrico Bocciardo, Via S. Giovanni Battista, 48/6, Genova-Sestri (Italio), kontraŭ 100 poŝtmarkoj el via lando, sendas saman kvanton el Italio.

50 gekomencantoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu al S-ro Garnero Pietro, Via S. Rocchetto, 8, Torino (Italujo).

Junulinoj 13/18 j. serĉas korespondantinojn; skribu : Kursu Esperanto-Lycée Mas de Tesse Montpellier - Francujo.

● **La esperanta rondo en la semajna revuo "Życie Bytomskie"**, eldonata en

urbo Bytom, Pollando, Kosciuszkostrato 11, serĉas kunlaborantojn en la tuta mondo, precipe en Aŭstralio, Afriko kaj Suda Ameriko, ankaŭ en ĉiuj landoj de Eŭropo. Bonvolu skribi poŝtkartojn aŭ leterojn kun proponoj de reciproka korespondado kun la polaj esperantistoj aŭ esperantistinoj el Silesio kaj urbo Bytom. Ni sendos al vi polajn poŝtkartojn, ĵurnalojn, librojn eldonitajn en Esperanto.

En 9-jara meza lernejo en Králiky, Ĉeĥoslovakio, oni komencis instrui nedevige Esperanton al 25 lernantoj. Ni petas ĉiujn esperantistojn sendi gratulesprimon al la direktoro de la lernejo kaj per salutkartoj plifortigi entuziasmon de la gelernantoj. Ĉiu ricevos respondon. Supra adreso sufiĉas.

19-jara fraŭlino deziras korespondi pri kio ajn kun ĉiuj landoj. Eva Balášová, Opletalova 239, Králiky, Ĉeĥoslovakio. **Du 14-jaraj lernantinoj** dez. kor. kun gelernantoj el ĉiuj landoj : Eva Tejklová kaj Hana Reichlová, Bílá Voda, okr. Ústí n. Orli, ĈSR. Marie Nižňanská, Červená Voda, ĈSR, kun ĉiuj pri ĉiuj. Anoj de junulara Esperanto-Rondeto de OB en Králiky.

Esperanto-Semajno : 24/25-2-1962. Sub aŭspicoj de la Belga Esperantista Fervojista Asocio kaj de la loka esperantistaro, en la EUROPO junulgastejo Brugge. Filmoj kaj informoj pri estontaj kongresoj-komuna dancado kaj kantado-esperantoforumo-ekskursoj-librostando-specialaj aranĝoj por la junularo. Prezo : 130f (infanoj 50%) = loĝado kaj manĝado. Rabato de 25% sur la belgaj fervojoj. Anoncado plejlaste je la 20.1.62. Pagado plejlaste je la 3.2.62. Mendu programon ĉe : BEFA Centraal station Brussel 1. Ĉiu bona !

LASTMOMENTE

KANADA ĈAMBRO

La unua donaco de 5000.— gld por aparta ĉambro en la nova domo de U.E.A. ĵus atingis la ĝeneralan sekretarion. Ĝi venis de Sinjorino D. C. Dorothy Henderson, Kanado, kiu esprimis la deziron, ke la ĉambro havu la nomon Kanada Ĉambro kaj estu dediĉita al la memoro de ŝia forpasinta patro. Koregan dankon al Sinjorino Henderson! Imitu ŝian grandaniman agon! Detaloj en la sekvonta numero de la revuo.

TUJ PAGU VIAN KOTIZON 1962!

Jam kvin jarojn aperas la riĉe ilustrita

NUNTEMPA BULGARIO

monata kultura revuo en Esperanto. Paĝoj 48 (ok el ili kororaj) krom la kovriloj. Formato 21/27.

Abonprezo 1,5 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en nacia mono.

Rapidu aboni por la sesa jaro, ĉar la eldonkvanto estas limigita.

Adreso: Nuntempa Bulgario, Levski 1, Sofio, Bulgario.

MODERNA NATURISMO

Por inteligentaj homoj

Informoj ĉe: INFE-sekretario Leif Heilberg, 1801 Page, San Francisco 17, Calif., Usono.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

- aktualaj informoj pri la sukcesoj de Esperanto
- Esperanto-filmo
- interesaj variaj artikoloj

40 JAROJN DA TRADICIO

EK DE NUN : 20 NUMEROJ JARE

Jarabono : 13,50 gld.

Nova redaktorino : Ada Fighiera-Sikorska

Abonebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe U.E.A.

KREDO FLOROJ DINAMITO

Tri biografiaj rakontoj pri Birgitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, fondinto de la moderna botanika scienco, kaj pri Nobel, la industriulo kaj inventinto de la dinamito, kiu tamen ankaŭ iniciatis la nobelpremiojn. La libro estas originale verkita en esperanto de la juna sveda fizikisto kaj instruisto d-ro Ernst Olsson.

80 paĝoj. Broŝ. 3.50 gld. Bind. 6.25 gld.

Aperis ĉe

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Malmö 7

Mendu ĉe U.E.A. aŭ via kutima libroservo.

Norda Prismo

kultura - socia - literatura
ilustrita revuo internacia -
kun kristala valoro
komencos sian okan jaron en 1962.

Ĉefredaktoro :

D-ro Ferenc Szilágyi
Döbelnsgatan 66
Borås (Svedlando) Tel. 244 22

Redaktoroj :

Baldur Ragnarsson	(Reykjavik, Islando)
Johan Hamond Rosbach	(Sarpsborg, Norvegujo)
Vilho Setälä	(Matinkylä, Finnlando)
Poul Thorsen	(Kopenhago, Danujo)

Jen unu letercitaĵo el la multaj : "Estas ĉiam ĝojiga momento, kiam alvenas via mirinde bela kaj tre interesa revuo." (C. H. el Clermont).

Abonanto, paganta antaŭ la 15-a de jan. 1962 (laŭeble tuj do) ĝuas favoron kaj pagas abonprezon de 10 sv. kr., t.e. 2 us. dol., 25 rk, 29 steloj. Poste abonprezo : 12:- sv. kr., 2:50 us. dol., 35 st., 30 rk.

Administrejo : Barnhusg. 8. **Stockholm**

Vi ricevos por tiu ĉi prezo ses numerojn (5-fojojn) riĉenhavan, interesan revuon.

Abonojn peras ankaŭ UEA.

AL ĈIU ESPERANTISTO : PROSPERIGAN NOVAN JARON !

Pro multokupiteco kaj tro ofta vojaĝado, mi devas sciigi je mia granda bedaŭro la informpetintojn ke mi — kontraŭvole — ne havas la tempon korespondi.

Ankaŭ la Esperanto movado en Hongkong ankoraŭ estas en embria stato kaj sekve ne ankoraŭ troviĝas korespondantoj en Hongkong.

Al seriozaj informpetantoj mi certe daŭrigos mian laŭeblan devon kiel delegito.

Bonvolu noti adresŝanĝon :

Dirk M. Brink

Oficeje :

203 Shell House

Hongkong

Tel. : 23936

Telegramadreso: ESPERANTO HONGKONG

Hejme :

49-A, Shouson Hill Rd.

Hongkong

Tel. : 92248

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.
Eldonis **BRUNA**, Nederlando.

Sur kvin kontinentoj infanoj
estas ĉarmegaj en
siaj ĝojo,
ĉagreno, ludo
kaj laboro
Konvinkiĝu
mem !

Prezo :

2,95 gld.

(11.80 steloj)

**MENDU ĈE
U.E.A.**

